

Bô Yin Râ

LA SÂGO DE JOHANO

KOBER'SCHE VERLAGSBUCHHANDLUNG  
BERN

El la Germana originalo  
(„Die Weisheit des Johannes“, eldono de 1979)  
tradukis A. Rehfeldt (<http://www.a-rehfeldt.de>)

EL ĈIO ĈI SEKVAS, KE MI REE KAJ REE REKOMENDAS AL  
VI LA EVANGELION LAŬ JOHANO, KIES ENHAVO AMPLEKSAS  
MOSEON KAJ LA PROFETOJN, EVANGELIISTOJN KAJ  
APOSTOLOJN ...

Goethe en letero al Herder, 20a de Februaro de 1786



# Enkonduko

La sonorele malalta muĝado de kaŝaj riveroj konstante sonadas tra la jarmiloj, kaj la tuta bruoj de la laŭta tago ne povas kaŝi tiun malaltan muĝadon antaŭ tiuj, kiuj volas aŭdi ĝin.

Certe, la oreloj de tiuj, kiuj helpas estigi la *bruon*, fariĝis preskaŭ *surdaj*, tiel ke ili povas ankoraŭ aŭdi nur tion, kio plej proksime ĉirkaŭtondras ilin, sed en ĉiu tempo tamen ekzistis homoj, kiuj tenis sin malproksime de la laŭtaj foiroj kaj en kvieta noktomeza tempo aŭskultis la sankte solenajn, forajn sonojn, kiuj estas percepteblaj el la profundoj de la praesto.

De tempo al tempo tiuj malmultaj fariĝas *multaj*, kaj iliaj oreloj akriĝas tiom, ke ili perceptas, eĉ en la plej sovaĝa tondrado, la pra-funde malproksimajn sonojn *pli klare* ol la laŭtegan bruon, kiu provas malhelpi ilin en tiu perceptado.

Ni vivas en la komenco de tia tempo.

Tagon post tago pligrandiĝas la nombro de aŭdantoj.

Ilin ne plu ĝenas la raŭka kriadado de jarfoiraj vokantoj, nek la rorado de sovaĝaj animaloj, nek la kastanjeta klakado de furiozaj dancistoj, kaj ridetante ili ignoras la tintadon de la sonoreletoj de buntaj burleskaj ĉapoj.

Ili nur aŭdas la *unikan*, sanktan sonorilan tonon – aŭskultas sole la konstantan, malalte sonantan muĝadon de la *riveroj de la eterneco* – kaj serĉas space kaj tempe en proksimeco kaj malproksimeco homojn siaspecajn, kiuj

povas diri, ke ankaŭ ili ĉie aŭdas la saman profundan muĝadon.

Hodiaŭ la plej bonaj homoj estas lacaj je ĉiu nura cerba saĝo.

Akrobataĵoj de l' pensado logas ankoraŭ nur junajn senilulojn aŭ maljunajn infanojn.

La spritaj konkludoj de pave fieraj subtilantoj estas rigardataj apenaŭ plu kiel malaltvaloraj moneroj fare de la eterne infana *amaso*, kaj nur de tempo al tempo oni sukcese aĉetas per ili ties favoron, same kiel marveturanto akiras la favoron de sovaĝuloj per buntaj vitroj kaj brilantaj falsaj perloj.

Sed kiu, estante proksima al la *vekiĝo*, serĉas la valoron de l' tera vivo en *farado* kaj *agado*, tiu volas akiri *alian* ekkonon: sopiras *eniĝi* en plej sekuran *certecon*, kiu ne jam morgaŭ fariĝas *malcerteco*, kaj al kiu la rezultoj de aliula esplorado ne povas, pli aŭ malpli frue, subfosi ĝian fundamenton.

En ĉiuj tempoj ekzistis homoj, al kiuj doniĝis tia certeco.

Ĝi ne estas akirata per *subtila konkludado*, kaj nenies cerbo povas *elpensi* ĝin.

Nenia riĉeco je ekstera *scio* estas necesa por ekhavi ĝin.

Kiu ajn vi estas aŭ kiom ajn alte oni taksas vian scion: – *certecon* vi atingos nur tiam, kiam vi lernis rezigni la ŝanĝbrilantan diversecon de via pensado! El viaj „sinsekvoj de pensoj“ vi faris al vi *labirinton*, en kiu vi perdis vin mem.

Vi povas trovi vin nur tiam, se vi iras la vojon returne al la *enirejo* de tiu labirinto: – returne tien, kie via pensado estis simpla kiel la pensado de *infano*. – – –

Ankaŭ la homoj de fora pratempe ne aliamaniere atingis saĝon kaj ekkonon. Eĉ hodiaŭ lumas la *sama* lumo, pri kiu oni mirante trovas sciigon ĉe la antikvaj viziuloj; sed se vi iradas en la mallumo de la *sinsekoj de pensoj*, vi facile povos negi ĝian ekziston, ĉar tien ĝi *ne* radias.

De tempo al tempo la antikvuloj vere pli estis „mastroj de la tero“ ol tiuj ĉi lastatempaj generacioj, kiuj, per siaj elpensado kaj subtilemo, fiere mem konstruis la karcero-murojn, kiuj poste baris al ili la rigardon en la senfinecon ...

Per sekuraj instinktoj ili kapablis ordigi kaj apartigi, kaj plene de *respekto* ili prenis en posedon tion, kion iliaj antaŭuloj havis por prezenti al ili kiel nepereontan, certan saĝon. Tiel tio sankta povis ĉiam esti savata el la ruinaĵoj de malnovaj temploj, kaj kvankam en ĉiu nova sanktejo leviĝis nova kulta bildo, ĝi finfine restis la simbolo de la *sama dieco* kaj estis bone konata al la inicitoj kiel tia.

Sed la homoj de la nun malkreskanta generacio – kiuj vadis tra plej diversaj superstiĉoj pli profunde ol ili suspektis, kaj kiuj arogante proklamis sian *imagadon*, *opiniadon* kaj *supozadon* kiel *scion* – vidis en ĉiu diobildo de antikvaj tempoj nur „idolon“, vidis en ties kulto nur la „superstiĉon“ de la antikvuloj, kaj ne rimarkis, ke apud ĉiu diokulto paŝadas profunde mistera *saĝo*, kiu ja malkaŝiĝas nur al homo kapabla *memstare formi al si propran juĝon*. –

Tiel ankaŭ la malnova mesaĝa skribo, kiun oni nomas „*evangelio laŭ Johano*“, fariĝis al multaj homoj, en la lastatempaj tagoj kaj probable ankoraŭ en la nuna tempo, ne

multe pli ol *libro de fabeloj*, plenigita per poeziaj atestoj de jam antaŭ longe malnoviĝinta superstiĉo ...

Iom post iom liberiĝinte de la timo ekzameni la tekston de la skribo – antaŭe rigardita kiel verko de la *spirito de Dio* – rilate ĝian *tempan* kaj *tergeneritan* formon, oni trovis en ĝi la spuron de antikvaj paganaj instruoj, kaj ĉar oni krome malkovris, ke ankaŭ la mirakla bildo de dia homo de la malnova mesaĝa libro ampleksas la trajtojn de kelkaj antikvaj diobildoj, la enhavo de la tuta skribo fariĝis al la lastatempaj homoj – kiom ili ne nomis sin „kristanoj“ – pia ĥimero.

Al tio probable multe kontribuis la fakto, ke oni posedas la malnovan sciigon nur en formo, kiu tre klare montras, ke la frivola, malsaĝa laboro de multaj manipulantoj donis al ĝi la formon, kiun ĝi nun havas.

Tre negative estis ankaŭ, ke jam en antikva tempo oni celis prezenti la „mesaĝon“ kiel verkon de la *discípulo* „kiun la majstro *amis*“, kaj tial faris ĉion por konformigi ĝin al la *pli fruaj* raportoj, kiuj – laŭplaĉe intermiksante veron kaj poezion – donas legendecan sciigon pri la surtera vivo de la alta majstro.

Oni do ne plu povis ekkoni, ke tiu malnova libro – estiĝinta pluraj jardekoj post la morto de l' majstro – ja *utiligis* la legendajn sciigojn pri la surtera vivado de la alta majstro, sed ke ĝia origina aŭtoro certe celis ion vere *alian* ol pligrandigi la nombron de la malnovaj miraklolibroj.

Tie ĉi estu nun prezentate, ke la malnova mesaĝo, kiun fruaj manipulantoj atribuis al „*Johano*“ kiun la majstro „*amis*“, estas skribo de „*scianto*“, kiu skribis por siaj fideluloj, kiuj jam antaŭe estis sciiĝintaj „*de buŝo al orelo*“



pri instruo, kiu vere estis „*ĝojiga mesaĝo*“ al ĉiuj ricevintaj ĝin.

El la sama sekura scio estu tie ĉi dirate, ke tiu unuafoje skribinta tiun mesaĝon ankoraŭ posedis malnovajn skribojn, kiuj prezentis en fidela kopio *vortojn el propraj mesaĝoj de la alta majstro*, kiujn la disĉiplo *Johano* prenis en konservadon post la morto de l' majstro, kaj tiam lasis siajn proprajn disĉiplojn kopii ilin.

Plue estu tie ĉi dirate, ke la disĉiplo kiun la majstro „amis“, estis la *sola* inter la „apostoloj“, kiu sciis pri la plej profundaj aferoj rilataj al la misio de sia majstro.

Sed post la morto de l' majstro li kolektis ĉirkaŭ si la malmultajn, kiuj dekomence *spirite* kaptis la instruon.

Kiam li mem estis mortinta, tiu unuiĝo de malmultaj fideluloj tamen konserviĝis, gardante profundan, sekretan scion. Tiu scio neniam povis adaptiĝi al la ekstera kulta rondo, kiu tuj trovis sin formita rezulte de la predikado de tiuj *aliaj* disĉiploj, de kiuj la elektito baldaŭ post la morto de l' majstro tenis sin pli kaj pli fore, kvankam la *legendo*, kiun la *ekstera kulto* kreis al si, tre penas montri, ke tiu disĉiplo estas intime *ligita* al *ilia rondo*.

La zorgo de tiu, kiu skribis la mesaĝon tie ĉi preparolota de mi, direktiĝis al la *posteuloj* de tiuj ĉi disĉiploj de la apostolo, – kiujn oni devas strikte *distingi* de la disĉiploj de la *Baptisto*, kiu portis la saman *nomon*: *Jehoĥanan*.

Ili vere ne akceptis la *miraklolegendojn*, kiuj *hodiaŭ* troviĝas en la libro prezentita al la posteularo kaj treege distordita, kvankam tiuj miraklolegendoj diras kelkon, kiu povas *heligi* al posteuloj la *bildon* de la majstro.

Ili *sciis* pri *spirita miraklo*, kiu ege *eklipsis* ĉiujn miraklolegendojn de la raportoj, kaj tiun spiritan miraklon ili konis el propra *spertado*. — — —

Sed kiom ajn zorge ili gardis kiel plej sanktan legaĉon la instruon de la alta majstro tiel, kiel Johano estis kompreninta ĝin, ili tamen tute ne hezitis, kie ajn ili trovis fadenojn de kaŝa *vero* en instruoj de sia tempo, enteksi tiujn fadenojn en la templokurteno, kiu en iliaj sanktejoj gardis la sekreton kontraŭ profanaj rigardoj.

Nur se oni bone atentis ĉion ĉi, oni ankoraŭ *hodiaŭ* povas — malgraŭ ĉiuj fremdaj manoj, kiuj detruis ŝanĝis la manuskripton de la unua skribinto — ekkoni la internan valoron de tio fragmentece restinta, kio eskapis la malsaĝan korektadon dum la unua tempo.

Oni do komprenos, ke la komence menciita *poeto* metas tiun ĉi mesaĝon super ĉiuj aliaj malnovaj kredsciigoj, dum pli nova *esplorado* uzas sian tutan sagaĉon por bati eĉ nur *unu* akcepteble ireblan *vojon* tra la sovaĝe surkreskita ĝardeno de ekkono, kiun ĝi maldensigu. — —

Kaj se oni nun demandas min, el kiu scio mi havigis al mi mem *certecon* pri tio, kion mi prezentas en tiu ĉi libro antaŭ ĉiuj samtempuloj kaj posteuloj, mi unue devas detruiri en ĝia ekĝerma stadio la eraron, ke mi tie ĉi eble proponas fruktojn de propra „*esplorado*“.

La vojoj tie ĉi kondukantaj al *certeco* estas tiom mallarĝaj kaj krudaj, ke ĉia propra bagaĝo, eĉ se ĝi estas trezoro de plej alta kaj sublima tera scio, devas esti postlasata, se oni ne volas riski stumblon sur tiuj altaj padoj.

Ekzistas „*scio*“, kiu *sola* povas scii pri tiuj ĉi aferoj kun *certeco*.

Tie ĉi „pruvoj“ estas atingeblaj nur al *tiuj*, kiuj ekde la pratempo *kulturas* tiun specon de „sciado“ kaj transdonas al la *konfirmoj* en ĉiu generacio tion, kion ili mem atingis en la sama maniero: – la *kapablon scii el memtransformiĝo*, en kiu la *scianto* fariĝas *scio* el la *objekto* de sciado. – –

Mi parolas el tia scio.

Mi volas doni *certecon* kaj scias, ke *certeco* ne estas atingebla aliamaniere. –

Malproksima de mi estas la deziro, persvadi aliulojn kredi al miaj vortoj.

Kiu volas ekkoni, ĉu mi donas voĉon kaj vorton al la *vero*, tiu serĉu konfirmon *en si mem* – en sia plejinterno.

Li ne vane uzos sian tempon por vidi *tion*, kion mi havas por montri al li, tiel, *kiel* mi devas montri ĝin al li ...

Iam kaj iam do eble ŝajnos, kvazaŭ mi tro malproksimiĝas de la temo de tiu ĉi libro, kaj ankaŭ ripetoj apenaŭ estos eviteblaj.

Mi ne intencas procedi laŭ sistemo aŭ regulo.

La malnova *mesaĝo*, kiu portas la nomon de „*Johano*“, tie ĉi ankaŭ ne ricevu *komentaron*.

La sola celo tie ĉi estas, montri la *puran instruon*, pri kiu la tiama skribinto povis esti certa, ke liaj fideluloj *jam konis* ĝin.

Krome mi volas kontraŭi la eraron, ke la malnova mesaĝo atestas la *saman kredopinion* kiel la tri *pli fruaj* raportoj pri la vivo de la „*sanktoleito*“, al kiuj oni jam en antikva tempo apudmetis ĝin, post kiam oni estis preparinta ĝin por tio.

Estos necese ankaŭ, nun meti iun aŭ alian teksteron en pli helan lumon, ol ke ĝi estu nur incidenta mencio kiel *ekzemplo* aŭ kiel rimedo de *komprenigo*, funkcio, kiun ĝi sufiĉe bone plenumus en siaj *konvenciaj* lego kaj signifo.

La alta *saĝo*, kiu malgraŭ ĉiu pli malfrua obskurigo ankoraŭ radias el la malnova teksto nomata „*evangelio laŭ Johano*“, fariĝu nun *gvida stelo* al ĉiuj serĉantoj, – gvida stelo, kiu heligas al ili la *vojon al la spirito!* –

\*

## La bildo de l' majstro

Iam fariĝinte *dio* por la sekvantaro de sia nomo, kaj predo de ekzalteca fantazio por tiuj, kiuj neniam kaptis tion plej profundan de lia instruo, la alta majstro, kiu alportis la „bonan mesaĝon“, estis tradiciata al pli malfrua tempo en la formo de bildo, kiu montras en plej povra konturo nur neklarajn spurojn de liaj terecaj trajtoj.

Kaj tamen al ĉiu, kiu volas kapti la veran instruon de la alta majstro, devas klariĝi unue la *tereca bildo* de la „sankt-oleito“, se li ne volas doni sin al *fantaziaĵoj* kaj ebriiĝi je mole piaj *revoj*.

Li, pri kiu oni povis raporti, ke li diris:

„KIAL VI NOMAS *MIN* BONA?

NENIU ESTAS *BONA*, KROM *DIO!*“

– kiom li estus *ekkolerinta en sia plejinterno*, se unu el tiuj proksimaj al li estus aŭdacinta fari dian honoron al li kaj nomi lin *dio* ...

Kaj kiel li elpelis la monŝanĝistojn kaj vendantojn el la templokortoj de ilia dio, tiel same li estus forpelinta per „skurĝo el ŝnuretoj“ ĉiun, kiu estus dirinta al li: „Majstro, ankaŭ al *vi* oni iam konstruos templojn!“

Li vere konsciis sian spiritan dignon, kiom ajn malgranda kaj hezitema li eble sentis sin de tempo al tempo.

Ĉar kie estus trovebla homo, kiu *konstante* montriĝus konscia pri sia tuta *forto* kaj pri sia plej alta *valoro*? –

Kiam lia konscio estas superlumigita en la alta spirita unuiĝo kun la „*Patro*“, kiun la *pravorto* rivelacias el la *pralumo* – la granda „*maljunulo*“ kiu estas en la „komenco“: la *homo de la eterneco* en sia pradonita genero – tiam lia parolo fariĝas „*potenca*“ kaj li sentas sin suprenlevita super ĉion terecan.

Tiam la *lumanto de la pralumo* montriĝas en sia plej alta *spirita potenco*. –

Sed en horoj de tereca ligiteco li tute ne timas malkaŝi eĉ sian plej profundan *animan angoron*, kaj lia alta ekkono ŝajne minacas forlasi lin.

„NUN MALTRANKVILIĜAS MIA ANIMO. KION MI DIRU? PATRO, SAVU MIN EL ĈI TIU HORO!“

Li ne retiras sin de *interrilatado kun aliaj homoj*, eĉ se ili tute ne estas liaj anoj: li *ĝojas* kun *ĝojantoj* kaj *funebros* kun *afliktitoj*.

Lia kunsentemo faras lin protektanto de *malriĉuloj* kaj *subpremitoj*, al kiuj li mem apartenas; sed samtempe li fariĝas amiko de kelkaj *riĉuloj* kaj *distingitaj homoj*.

Li volonte akceptas *gastaman inviton*, eĉ tie, kie oni apenaŭ kredas je lia misio kaj invitis lin nur por vidi tiom strangan gaston.

Kie ajn li trovas *bonkorecon*, li estas plena de plej amanta komprenemo; nur *hipokritecon* kaj *malmolecon de l' koro* li renkontas kun *senindulgaj vortoj*.

Al neniu li trudas sian instruon; sed kie li sentas, ke oni *deziregas* ĝin, kvankam ankoraŭ ne konscie ĝin *konante*, tie li

donas tion, kion liaj aŭskultantoj – liaopinie – devu povi kompreni.

Li ne serĉas *honorajn*, sed se oni honoras lin, li sentas sin inda je *ĉia honorado*, kaj kiam malvasta spirito inter liaj akompanantoj lamentas pri disipado, ĉar multekosta narda kremo devas servi por refreŝigi la piedojn de l' majstro, anstataŭ esti vendata por mildigi la mizeron de *malriĉuloj*, li diras serene:

„*MALRIĈULOJN VI ĈIAM HAVAS KUN VI, SED MIN VI NE ĈIAM HAVAS.*“

Dirante tion, li *tute ne* – kontraste al pli malfrua interpreto – antaŭvidas sian baldaŭan *morton*, sed pensas nur pri tio, ke li ne longe restadas en la sama loko.

Nenio homa estis fremda al li, kaj li tre bone sciis pri la batalo de la *spirita naturo* en la homo kun la malfacile venkeblaj avidoj de la *homa animalo*. –

„*VI JUĜAS LAŬ LA ŜAJNO, SED MI JUĜAS NENIUN, ĈAR ANKAŬ LA PATRO JUĜAS NENIUN.*“

Plenigita de sia misio, li deklaras, ke oni detruu la „templon“ – la regantan sacerdotan instruon – , kaj li aŭdacos „rekonstrui“ ĝin „en la daŭro de tri tagoj“.

La aŭskultantoj de tiu parolo sciis tre precize, *pri kio* li parolis, sed ili bone konservis tiun diron por poste povi deklari lin kulpa pri *blasfemo kontraŭ la templo*.

Sed li ankaŭ volonte lasas sin *miskompreni*, kiam li scias, ke ĉiu klarigo ne alportus al li *tiun* komprenon, kiun li serĉas.–

Plene konsciante sian apartan spiritan pozicion inter la homoj de sia tempo, li tre memfide povas diri:

„VI ESTAS DE MALSUPRE, MI ESTAS DE SUPRE.

VI ESTAS DE ĈI TIU MONDO, SED MI NE ESTAS DE ĈI TIU MONDO.“

Sed li ankaŭ sciis, malsame al ĉiuj, kiuj estis proksimaj al li, *de kie* venis al li lia alta digno, – sciis pri sia multjara spirita *instruiĝado*, – sciis pri la severa *luktado en si mem*, al kiu li fine ŝuldis la *certecon*, el kiu li nun devis paroli kaj instrui, „ne kiel la skribistoj“. – –

La alta mistero de lia misio estis konata nur al malmultaj, kaj eĉ la malmultaj ne komprenis ĝin, krom tiu *unu*, kiun li „amis“.

Nur tiu ĉi unu ankaŭ sciis pri la spirita *vojo de disvolviĝo* de sia majstro kaj pri la plej profunda *bazo* de lia rajto *instrui*.

Kiam post la morto de l' majstro „la ŝafoj de la grego diskuris“, tiu ĉi disĉiplo kolektis ĉirkaŭ si tion, kio estis de *lia* speco, kaj transdonis sian scion al tiuj, kiuj en lia instruado pruviĝis taŭgaj.

Nur en pli malfrua tempo, – en kiu konstante kreskis la *ekstera kulto*, kiu estis formiĝinta el ekzistantaj malnovaj ritoj kaj kiu kreis al si la *kultan dion* el la bildo de l' alta majstro, – disiĝis la malgranda rondo el *spirite orientiĝintaj homoj*, kiuj antaŭe estis anoj de *Johano*.

Publike kritikitaj akre kiel „herezuloj“, ili malaperis en kaŝiteco, kaj kune kun ili la *bildo de l' majstro*, kiu *neniam* en sia vivo ŝajnis sin esti „*mesio*“, kaj estus rigardinta kiel senhonorigon de si mem la provon rilatigi al si mem profetajn eldirojn, pri kiuj, post lia morto, pli malfruaj homoj kredis, ke



ili „*longe antaŭe anoncis*“ lin; sed kiuj estas interpretendaj en tute *alia* senco. – –

\*

## La surtera vojo de la Lumanto

Tie ĉi doniĝas al mi la tasko kaj devo, montri la *disvolviĝon* de la alta majstro, kiu – kiom ajn kaŝita restis lia ekzisto al la *historio* – fariĝis *signo de kontraŭdiro* ĝis la hodiaŭa tago, rezulte de la legendaj raportoj pri lia vivo kaj de la kulto, kiu denove ekflorigis la malluman mistikon de antikvaj dioinstruoj, sub *lia* nomo.

Mi tie ĉi raportos, kio montriĝas al la vidanto, kiu povas sciigi el *certeco* tion, kio jam de longe estas nealirebla al ekstera perceptado.

Li naskiĝis en *Nazareto* en Galileo, kaj *ne* estis nur nomita „Nazoreo“ laŭ mistika sekto. Lia patro kunprenis lin en lia plej frua infanaĝo kune kun lia patrino kaj iris al *Egiptujo*, kie tiutempe la metio de l' patro trovis bone pagatan laboron. El tiu fakta okazaĵo fariĝis pli malfrue la legenda „*fuĝo al Egiptujo*“ . –

Reveninte al sia hejmloko post kelkaj jaroj kaj tiam sufiĉe adoleskinte, li helpis sian patron en ties laboro, kaj tiel lernis, kvazaŭ ludante, fari la unuajn assistajn manipulojn, kiuj estis adekvataj al liaj fortoj.

Tiel li jam en frua adoleska aĝo fariĝis helpanto de sia patro, fariĝis *ĉarpentisto*, kio tiutempe signifis, ke li lernis ne nur *konstrui* tion, kio povas esti konstruata el ligno, sed

ankaŭ fari el ligno ĉiun fortikan ilon por uzo en la domo kaj sur la agro.

Por la akirado de eĉ nur la plej malgranda ekstera erudicio ne ekzistis sufiĉa tempo, kaj ankaŭ ne estis konforme al *moro* aŭ *kutimo*, ke malriĉa juna metiisto strebu al tiaj aferoj.

Nur kiam lia *spirita* disvolviĝo – pri kiu mi nun devos sciigi – estis jam longe *finita*, li lernis, gvidate de amikiĝintaj erudiciuloj, la arton de *skribado* per la signoj de sia patrina lingvo.

Sed lia *spirita* disvolviĝo okazis tiele:

De sia patro li estis aŭdinta nur la *preĝojn*, kiujn ĉiu pia judo kutimis preĝi.

En ĉiu sabato li aŭskultis la kutiman *klarigon pri la Leĝo*, kiu estis tradiciita de la antikvuloj.

Ankaŭ tie ĉi, nur malmulto estis malfermita al *li*, kiu *ne* povis *legi* en la skriboj.

Ekde lia frua juneco, doniĝis al li – kiam li, laciĝinte de la laboro, sed ne laca *spirite*, kuŝis ankoraŭ maldorme sur sia simpla kuŝejo, – mistera *spirita* instruado, kiun li tenis strikte kaŝe eĉ al siaj gepatroj. Rezulte de tio li kredis, ke li pli kaj pli ekkonis la saĝon de la Leĝo, kiun saĝon ekkonis – kiel li opiniis – tiuj aliaj, kiuj sciis legi mem en la skriboj.

Kelkfoje li nevole *malkaŝis sin*, kiam li aŭdis la pliaĝulojn en la komunumo paroli pri demandoj de la Leĝo en sabato aŭ altaj festoj, kaj el sia interna instruiĝo trovis la ĝustan respondon. La pli malfrua legendo, kiu montras la *knabon* instruantan meze de la *instruistoj* en la *templo* en *Jerusalemo*, do tamen esence baziĝas sur fakta okazado,

kvankam la templosacerdotoj en Jerusalemo certe ne estis la unuaj aŭskultantoj de lia saĝo. –

La unua renkontiĝo kun unu el la „*lumantoj de la pralumo*“, kies alta frato li estis fariĝonta pli malfrue, ĉar li *laŭ sia speco* apartenis al ilia rondo *longe antaŭ* ol lia tera okulo ekvidis la lumon de la tera suno, jam okazis dum liaj pli malfruaj adoleskaj jaroj en *Kapernaumo*, kie li tiutempe vivis ĉe parencoj de sia patro, por plenumi komision de sia patro en kelksemajna laboro.

Li ankoraŭ ne sciis, *kiu* estis tiu, kiu renkontiĝis kun li en vespera solena horo je la lago, kaj kiun li ofte ree renkontis en la sama loko, kaj kiu sciis pli kaj pli malfermi lian koron kaj heligi lian rigardon en la plejinternon de la esto.

Sed baldaŭ *pliiĝis* renkontiĝoj de la *sama* speco, tiel ke ŝajnis al li plu apenaŭ strange, ke li ricevis tiom klarigan instruon de tiuj evidente apartenantaj al la sama rondo; sed li tenis ĉion en sekreto, ĉar oni tion estis ordoninta al li. Tiel li pasigis plurajn jarojn, dum kiuj lia interna ekkono konstante kreskis. Tiam unu el la viroj, – kiuj nun estis por li kvazaŭ malnovaj amikoj, kvankam li sin klinis respektplene antaŭ ili, – rivelis al li, ke nun estas la tempo, ke li submetu sin al regula *instruado*, kvankam tio tute ne detenos lin de la laboro de liaj manoj.

Oni indikis al li, ke tiu instruado celas kapabligi lin ne nur ekkoni *mem* la saĝon de la Leĝo plej detale, sed tiam ankaŭ montri la saman saĝon al *aliuloj*, por ke la multaj, kiuj serĉis animan nutron en la skriboj, ricevu ne nur la sekan interpreton de la *skribistoj*, simile al tio, ke malsatanto petas *panon*, kaj oni donas al li *ŝtonon*.

Ekde tiam li konscie staris sub la kontinua spirita gvidado de tiuj, al kiuj li apartenis laŭ sia esenco.

Lia ĉiutaga laboro ne povis malhelpi al li dediĉi sin al tiu instruado kaj trapasi ĉiun provon, kiun ĝi postulis de li.

Tuj kiam li komencis stumbli, aŭ timoplenaj duboj minacis lin, unu el liaj instruantoj nerimarkate ĉiam venis al lia flanko, fortigis lian fidon kaj forpelis la demonaron, kiu antaŭe volis timigi lin.

Post spirita instruado daŭrinta jarojn, li fine estis tiom maturiĝinta, ke la lasta vualo falis de liaj okuloj kaj li mem nun vidis sin en sia alta misio.

En klara stelluma nokto, sur rokaltaĵo proksima al lia loĝloko, li ricevis sian konsekron kiel *majstro de la lumekkonado*, kiel *amanto en la lumo*, kaj kiel *lumanto inter lumantoj*...

Nun li konsciis *sin mem* kiel „*vojon*“ – nun li konsciis *sin mem* kiel „*veron*“ – nun li konsciis *sin mem* kiel „*vivon*“ el la suno de ĉiuj sunoj, el la lumo, kiu heligas la eternecon. –

Ekde tiu tago li komunikis plej klare al aliuloj tion, kio estis doniĝinta al li.

Nun li parolis kun la konscio de sia interna *rajtigiteco*, kaj celis montri, helpe de la malnovaj skriboj nun spirite malfermitaj al li, la plej profundan sencon de la malnovaj profetaj vortoj, kvankam li plue praktikis sian metion kiel antaŭe.

Liaj aŭskultantoj miregis pri lia parolo kaj ne povis klarigi al si, de kie al li, la neerudito, venis tia scio.

Tiom eksterordinara ŝajnis al la amikoj kaj al la parencoj la ŝanĝiĝo de lia esenco, ke ili, malgraŭ la

profundeco de liaj vortoj, opiniis ke li „*frenezas*“, kaj li fine ne plu povis resti en sia hejmlando.

Do li foriris por gajni sian vivtenon per la laboro de siaj manoj en alia loko, kie oni ne konis lin, kaj por vekti la animojn per sia parolo. Sed kien ajn li venis, li ne povis resti, ĉar oni aŭdis lin diri aferojn, kiuj neniam antaŭe estis diritaj, kaj la skribistoj estis plenaj de envio pro tio, ke multaj ŝajnis kredi al li pli ol al ili. Tiam li erarvagadis dum sufiĉe longa tempo, ĝis li fine direktiĝis al *Kapernaumo*, kiun li antaŭe ekŝatis, ĉar tie estis okazinta la unua renkontiĝo kun unu el siaj altaj fratoj, kiuj ankaŭ nun esperigis al li, ke li tie trovos la serĉatan kvieton.

Tie en *Kapernaumo* doniĝis al li la amikeco de riĉa viro, kiu akceptis lin kun granda ĝojo kaj aŭskultis liajn parolojn entuziasme. En la domo de tiu ĉi viro li trovis aliajn, eruditajn amikojn, kaj en tiu ĉi rifuĝejo li lernis de ili legi kaj skribi la literojn de sia lingvo.

La *estimo*, kiun li ĉi tie ĝuis ĉe estimataj personoj, iom post iom estis disvastiginta lian renomon en la ĉirkaŭo.

Ĉar en tiu tempo la popolo kredis, ke tia saĝulo ankaŭ disponas sekretajn artojn, per kiuj li povas *kuraci* ĉiun *malsanon*, jen tiu, jen alia venis en la domon de la distingita viro kaj petis, ke la saĝa rabeno kuracu lin.

Komence la majstro rifuzis tiun peton kaj sendis la malsanulojn al la kuracistoj.

Sed tiam okazis amasiĝo, kaj, kaptite de kompatato, li eliris al la malsanuloj por konsoli ilin. Sed okazis, ke multaj el tiuj, kiujn li estis *tuŝinta*, baldaŭ poste sentis sin *kuracitaj*, tiel ke la majstro mem unue ne sciis, kiel prijuĝi tiajn aferojn.

Ekde tiam li ne plu povis rifuzi la petojn de la malsanuloj, kiuj postulis de li nenion alian, ol ke li *tuŝu* ilin.

Eĉ de malproksime oni alkondukis al li malsanulojn, kaj la kredo je lia „forto fari miraklojn“ pli kaj pli kreskis. Kiam iu poste deklaris sin kuracita, la majstro mem ĉiam emfazis, ke nur ties propra *fido* helpis lin.

Li ankaŭ malpermesis al ĉiu, rakonti pri sia kuraco al aliuoj, ĉar li sentis sin apenaŭ plu kapabla mastri la amasiĝon. Sed en la fluo de la tempo li ekkonis, ke li interne posedis *forton kuraci*, kaj ke la kaŭzo de ilia kuraco estis ne *nur* la fido de la kuracitoj.

Kvankam li povis kuraci ne *ĉiujn* malsanojn, la nombro de kuracitoj tamen ĉiutage pligrandiĝis.

Ne mallongan tempon de l' tago li bezonis por meti la manon sur ĉiujn, kiujn li kuracu.

Sed ĝis malfrue en la nokto troviĝis homoj kolektiĝintaj ĉirkaŭ li, kiuj aŭskultis lian novan interpretadon de la leĝo, kaj inter ili li trovis la unuajn, kiuj ŝajnis al li taŭgaj por fariĝi liaj apartaj *disĉiploj*.

*Nur* al ili li provis malkaŝi, de kie *li mem* estis ricevinta sian saĝon.

Jam antaŭ longe li estis ekkoninta, ke li nun apenaŭ plu povis praktiki sian *metion*.

Sed ĉar li sciis, ke li ĉiam abunde trovos tion bezonatan, se li – laŭ la *spirita* leĝo – lasus al sia „*patro*“ nutri kaj vesti lin, estiĝis nenia zorgo en li, kaj fine li petis sian gastiganton, ke li nun lasu foriri lin, por ke li povu instrui ankaŭ en aliaj lokoj.

La kontraŭularo de la unuaj tagoj jam de longe ne plu ŝajnis al li minaca.

Sed la unuaj disĉiploj trovitaj de li en *Kapernaumo* ne volis forlasi lin kaj sekvis lin. Ĉiu el ili siamaniere enprenis en si tion, kion la majstro havis por doni al ili.

Pro lia renomo kiel *kuracanto*, en kelkaj lokoj li kaj liaj disĉiploj estis *ĝoje bonvenigata*, sed en aliaj lokoj li devis sperti *plej krudan rifuzon*, kaj por la homoj de sia *hejmloko* li restis la aroganta „*frenezulo*“, kiun ili jam komence estis vidintaj en li.

Sed la popolo nomis liajn kuracojn – tie, kie ili povis okazi – „*mirakloj*“, kaj oni ne komprenis lin, kiam li en tiaj okazoj ĉiam emfazis, ke nur la *propra fido* kaj la *forto elfluanta* el la *korpo* de la kuracanto estigas tiajn „*miraklojn*“.

Al la malnovaj instruoj de sia popolo li donis *interpreton*, per kiu ili povis ankoraŭ teni sian pozicion eĉ antaŭ *pli alta* ekkonado, kaj nur tie, kie li vidis, ke sterilaj formuloj premis la fidelulojn, aŭ ke la tenebra tribo dio de la pratempo postulis oferojn, li parolis la vorton:

„AL LA *ANTIKVULOJ* ESTAS DIRITE ...“ „*SED MI* DIRAS AL VI ...!“

Post kiam li estis ĉirkaŭirinta en *Galileo* dum preskaŭ unu jaro, kuracante kaj instruante kun varianta sukceso, li ekopiniis, ke lia parolo povas ricevi la adekvatan resonon nur en *Jerusalemo*. Jam anoncote plej favore fare de liaj amikoj en *Kapernaumo* al *ties* amikoj en la sankta urbo, li kaj liaj disĉiploj aliĝis al la pilgrimoj, kiuj migris al *Jerusalemo* por la *Paska festo*.

La distingitaj amikoj gastame akceptis lin, sed jam lia unua publika apero altiris al li la malamon de la *templopastroj*.



Tial li baldaŭ forlasis la urbon, sed, *ne* returnante al Galileo, restis en la urba proksimeco, por ree kaj ree iri en la urbon por mallonga tempo. Sed li pli kaj pli evitis ĝin, ĉar estis klariĝinte al li, ke liaj distingitaj amikoj apenaŭ povus protekti lin, se li falus en la manojn de la *pastraro*, kiun li en siaj paroloj estis tre severe atakinta.

Li *kuracis* kaj *instruis*, kie ajn li estis, same kiel antaŭe en Galileo.

Li do fariĝis la *espero* de pli kaj pli grandaj rondoj de homoj, aparte inter la malriĉuloj kaj senrajtigitoj, kiuj havis eĉ pli malbonan opinion pri la subjugiganta reĝimo de la pastraro ol pri la fremdaj subpremantoj. Tiel okazis, ke la popolo pli kaj pli kredis, ke li estas *tiu*, kiun laŭsupoze la malnovaj skriboj *promesis* kaj kiu nun devas liberigi la mizerulojn el la subpremiteco fare de la pastroj kaj romianoj.

Tiuj el la ĉiam malkvieta amaso de la ĉefurbo, kiuj tiel pensis, estis eksciintaj, ke la majstro ree venos al *Jerusalemo* mallonge antaŭ la Paska festo, kaj ili faris ĉiujn preparojn por proklami lin *reĝo* tuj post lia alveno, ĉar ili opiniis, ke la potenco de la *pastroj* estas sekurigita nur de la romiaj kohortoj, sed ili pro sia malvasta rigardo ne povis kompreni la potencon de la *romianoj*.

Kiam la majstro alvenis, oni kun granda jubilado iris renkonte al li antaŭ la pordegojn – viroj, virinoj kaj infanoj – kaj iliaj reprezentantoj postulis de li, ke li konduku ilin kontraŭ la premantoj.

Forte impresita de ĉio kion li vidis, li perdis la certecon de sia interna decidado, kaj same kiel Moseo laŭlegende *dubis*, ĉu li povas havigi akvon al la popolo, li *kredis* dum

kelkaj momentoj, ke la potenco, kion oni volas atribui al li, povas fariĝi *subteno por lia misio*.

Tre baldaŭ li ekkonis sian eraron, kaj apenaŭ enirinte la urbon, li forlasis la ekscititan amason kaj serĉis rifuĝon en la domo de unu el siaj distingitaj amikoj, ĝis la aro da homoj estis dispelita de la romiaj gardistoj.

Sed la *sekvoj* de lia mallonga ŝanceliĝo ne plu povis evitataj en la *spirita* kaj en la *tera* sferoj.

Jam de longe *malamata* de la templopastroj kiel amara admonanto kaj *timata* de ili pro lia renomo ĉe la popolo, li mem nun estis kreinta la oportunon por meti plendon kontraŭ li ĉe la romiaj aŭtoritatoj, kiel oponanto de ilia regado kaj *ribeliganto de la popolo*, volanta fariĝi ties *reĝo*.

La romiaj aŭtoritatoj vere estis kutimiĝintaj al tumultoj en tiu ĉi popolo kaj plej volonte ignorintus la plej novan, sed ĉe tiuspeca plendo ne plu estis eble, ne aresti la kulpigiton.

La prudenta romia prokuratoro, kiu klare ekkonis, el kiuj kaŭzoj oni tie ĉi bezonis lin, sentis sin ofendita en sia fiereco, kaj provis retiriĝi el la devigo eldiri verdikton.

Tial li ŝovis la taskon de pridemandado al tiuj prezentintaj la plendon.

Li ne sciis, kiom bonvene estis al ili, kondamni la malamaton laŭ *sia* leĝo ŝajne el plej bonaj kaŭzoj.

Ekzistis sufiĉe da paroloj liaj, kiujn oni antaŭe ne kuraĝis puni kaj kiuj nun povis aperigi lin kondamninda al *morto*. Krome, li estis „blasfeminta la *templon*“: kion pli oni bezonis! Sed ĉar al ili ne estis permesate, sub la potenco de la romianoj, *plenumi* la mortverdikton, ili bezonis nur insisti pri tio, ke li delogas la popolon kaj volas lasi sin proklami *reĝo*,

por *devigi* la romian juĝistaron *plenumi* anstataŭ ili la verdikton estiĝintan el malamo.

La sekvo estis, ke la malamato mortis sur la romia krucumilo, post kiam romiaj solduloj el la tuta mondo kaj judaj temploservistoj estis preskaŭ mortige turmentintaj lin.

Sed nur tiam, kiam lia surtera agado ŝajnis jam finita, la majstro faris tiun plej grandan *amofaron*, per kiu li restas, por ĉiuj, kiuj vidas en la spirito, alte sublimes super ĉia homa grandeco por ĉiuj tempoj, kiel la *plej granda el ĉiuj amantoj*, kiujn la tero iam portis, – kaj ne povas iam veni post li iu, kiu atingus lian amoforton ...

En tiu ĉi lasta horo li sukcesis, unuigi la *homoanimalon* en si kun la potenco de la *spirito* en *absoluta unueco de sentado*, tiel ke li povis *ami* la neniigantojn de sia tera vivo, dum la neniigo, kiel *sin mem*.

La *nevidebla* tero, kiu portas en si tiun ĉi terglobon same kiel ovo la flavon, estas, ekde tiu alte sankta horo, por ĉiam malligita el la potenco de la „princo de tiu ĉi mondo“, tiu nevidebla *pasema* potenculo, konscia nur pri *si mem* sed *ne* en la *spirito*, kiu spertas sin mem en la senama mallumo de la *materio* kaj deziras tiri *ĉion* en sian *propran* spertadon ...

Kiel li mem estis venkata en tiu horo, tiel same ĉiu potenco de la mallumo sur tiu ĉi tero nun povas esti venkata de tiuj, kiuj *scias* pri tiu potenco de la homo kaj estas „*de bona volo*“: volante *el la amo*.

Se la homaro de la tero scius pri sia potenco: – vere, ĝi jam estus ŝanĝinta la vizaĝon de la tero dum preskaŭ du jarmiloj, tiel ke la homoj ankoraŭ nun suferantaj la teran

mizeron spertus staton, kiu devus aperi al ili kvazaŭ la ĉiela beateco. — —

Certe, sur tiu ĉi tero *neniam* povas esti kreata „*ĝardeno Edena*“, sed tio, kio tamen povas esti ŝanĝata tie ĉi, estas tiom grandioza, ke pli malfruaj homoj estos samamaniere plenaj de hororo, trovinte la spurojn de *hodiaŭa* okazado inter homoj, — kiel teruro kaptas ĉiun *hodiaŭ* vivantan, kiam li malfermas la tombojn de tiuj homanimalaj prauloj, kiuj, kiel la trovaĵoj montras, suĉis la cerbojn el la kranioj de iliaj malamikoj kaj manĝis la medolon el iliaj ostoj. — — —

Nur kiam tiu ĉi homaro ekkonos, *kion ĝi kapablas fari*, se ĝi, agante *el la amo*, volas ŝanĝi la vizaĝon de tiu ĉi tero, tiu ama ago sur Golgota finfine fariĝos al ĝi *fruktodona*. — — —

\*

## La finiĝo

Tio plej granda, kion tera homo iam povis plenumi, estis plenumata en la *krucumila morto* sur Golgota: – *la sorto de l' tera homo estis malligata el kosma ligiteco!* –

Nun devas esti plue raportata tio, kio okazis *post* la tera morto de l' majstro, ĉar jam en la unua tempo la *vero* devis suferi *vualadon* fare de la pia *fantazio*, vualadon, per kiu la *reala* okazado estis restonta *kaŝita* al ĉiu pli malfrua tempo. –

La pia legendo ja portas en si la *kernon* de la vero, kaj tiu, kiu povas ekkoni ĝin sub ĝia ŝelo, ne estos trompita.

La Lumanto ja „*releviĝis*“ el sia tera tombo, sed en lia „*releviĝo*“ la *tera formo* ne plu povis esti portanto de lia esenco.

La Lumanto ja estas ankoraŭ *hodiaŭ* ĉe tiu ĉi tero, kaj al siaj fratoj, kiuj agadas en tera formo, li estas videbla en sia *spirita* formo, kiu plene konformas al lia tera formo, en kiu liaj disĉiploj konis lin.

Sed ĉio ĉi certe ne povas malhelpi, ke la *tera okazado* post la morto de l' majstro ankoraŭ havas signifon por la hodiaŭa mondo.

Estu do prezentata tio, kio montriĝas al spirita vidado, ĉar la *kerno* de la pia kredo, kiu feliĉigis la homojn tra jarcentoj, apenaŭ plu bezonas vualon en tiu ĉi tempo, sed *kaŭze* de la vualo venas en danĝeron *ne esti ekkonata* de tiuj serĉantaj ĝin.

Sekvu nun tie ĉi la raporto:

La distingitaj amikoj de la majstro tuj post lia morto energie uzis ĉiun eblon por ricevi la *korpon* de l' mortinto helpe de la romia prokuratoro, ĉar antaŭe estis malsukcesintaj ĉiuj iliaj klopodoj evitigi al li la iron al morto.

La prokuratoro estis bonvolema al la amikoj de la majstro, kaj plena de malestimo por la templopastraro, kiu sciis devigi lin kondamni viron, kiu al li tute ne aperis danĝero por la ŝtato. Li nun tre volonte donis al la amikoj ilian *mortinton*, post kiam li antaŭe malgraŭ sia plej bona volo ne kapablis savi por ili la *vivanton*.

Sed kiam la tempopastroj aŭdis pri tio, sciante kun certeco, ke la *prokuratoro* ne aŭskultos ilin, ili preme petegis la *estron de la urba gardistaro*, ke li disponigu al ili gardistojn por gardi la tombon, ĉar ili timis, *ke alie la sekvantaro de la mortinto vekriante lamentos ĉe la tombo kaj poste direktos sian koleregon kontraŭ la pastroj*. Do la tombo ricevis romian gardantaron, kiu havis la taskon tie malebligi ĉiun amasiĝon.

En tiu tempo la altaj *fratoj* de la majstro – kiuj iam *instruis* lin kaj *plenumis* lian perfektigon kiel *pastroreĝon*, kiel iun el sia aro – ankoraŭ kaŝe vivis en proksimaj lokoj en la judea montaro, kie la alta majstro estis ofte renkontintaj ilin en la soleco, kaj vizitintaj ilin en la lokoj de ilia kaŝiteco.

Ili sciis, kio estis okazinta al li, kaj ili ne estis povinta savi lin, ĉar lia spirita kulpo: ke li – kvankam nur por momentoj – volis meti eksteran teran *potencon* al sia flanko, estis eliginta lian sorton el sub la alta spirita gvidado, sub kiu ili staris kaj kiu kondukis ankaŭ lin, *antaŭ* ol li lasis delogi sin, por

mallonga tempo dum tiu eniro en Jeruzalemon, per la premanta petegado de tiuj, kiuj vidis en li la savonton el la ekstera opresado.

La ŝanĝo de la leĝoj en la *nevidebla* tero, kiun li *mem* tiam *efektivigis* per sia ama ago sur Golgota, estus *ŝparinta* al li lian teran sorton, se *antaŭ* li *aliulo* estus *efektiviginta* ĝin. –

Sed ĉar tiu ĉi ŝanĝo povis nur en lia lasta horo esti *efektivigata per li*, liaj altaj fratoj devis, dolorplene kaj tamen kun interna jubilado atendente lian venkon, lasi lin ekiri sur la suferovojon. – –

Ili nun sciis pri lia *tombo*, kaj li estis proksima al ili *viva* en sia *spirita* formo.

Ili do faris tion necesan, *kun lia plena konsento* kaj *laŭ lia volo*, por ke neniu malsaĝa kulto formiĝu pri lia *tera korpo*.

Estis unu inter ili, kiu scipovis la arton enigi homojn en magian dormon dum nura dialogo.

Tiu ĉi iris antaŭe al la tombogardantoj, kaj ĉar li estis vestita kiel elstara romiano, la gardantoj respektplene respondis liajn demandojn, ĝis iliaj langoj povis nur lalai, kaj ili fine malleviĝis, falante en profundan songodormon.

Nun estis veninta la tempo por voke venigi la aliajn fratojn, kiuj atendis proksime.

Kun kelka peno oni malfermis la tombon kaj plej zorge elprenis la korpon. Tiam oni metis ĝin, kiu estis ĉirkaŭligita per bendoj, sur du longajn tukojn kunalportitajn, tiel, ke ĝi kvazaŭ *sidis* sur unu, dum la alia tenis la supran parton de la korpo.

En lunluma nokto oni senprokraste portis la amatan pezan ŝarĝon kun granda peno alten en la montaron, ĝis roka ravino, kiun oni jam antaŭe estis elektinta: – kie antaŭtage estis preparita *ŝtiparo*, kaj kie atendis du el la altaj fratoj.

Tiuj fratoj estis distingitaj viroj el fremda tribo – iam venintaj de malproksime el oriento – kaj laŭ la kutimo de ilia tribo la kara kadavro nun estis *forbruligata* tie ĉi, kie oni estis sekura kontraŭ ĉia ĝeno. Krome, la luna lumo mildigis la brilon de fajro, kaj en tiu tempo neniu homo havis sian loĝejon en tiu dezerta regiono, tiel ke fajro ne estus rimarkita, eĉ se la ravino ne jam estintus sufiĉa protekto kontraŭ malkovro el la ĉirkaŭanta vastaĵo.

Kiam en la hela matenruĝo la ardaĵoj de l' fajro estingiĝis, la altaj fratoj zorge kolektis ĉiujn restaĵojn, envolvis ilin en tukon kaj portis ilin, longtempe migrante, al *Jordano*, por enmeti tion lastan, kio restis el la tera formo de l' majstro, en la akvon de tiu ĉi rivero, laŭ la moro kaj kutimo de sia tribo.

Reveninte, ili restis sufiĉe longan tempon en siaj kaŝaj lokoj en la montaro, kaj de tie ili iam kaj iam vizitis la disĉiplojn de la majstro, kiuj post lia forpaso el la videbleco ankoraŭ restis en lia *ŝpirita* komuneco.

Sed dek du monatoj poste ili *por ĉiam* forlasis la regionojn de Palestino, kaj migris al *oriento*, en la direkto de sia hejmlando proksima al la plej alta montaro de la mondo ...

Ili *vere* estis la „reĝoj“ el oriento – la *pastroreĝoj* kaj *reĝaj pastroj* – kiuj iam estis „vidintaj en la oriento“ la „stelono“ de la juna ĉarpentisto el Galileo kaj venintaj por instrui lin, ĝis li mem povis kompreni sian mision, – kvankam ili *ne*, kiel rakontas la pli malfrua legendo, kliniĝis



jam antaŭ la *infano* en la staltrogo por alporti al li siajn donacojn. – –

La legendo nur laŭ sia maniero formis tion, kion la malmultaj, kiuj estis plej proksimaj al la majstro, estis sciiĝintaj de li mem kaj pli malfrue konfidis en profunde sekreta parolo al tiuj, kiuj serĉis instruon ĉe ili.

Tiu formado supozeble okazis laŭ antikva, malproksima *modelo*, kaj tamen ĝi konservis la trajtojn de la *vero*, ĉar kvankam *sep* el tiuj altaj fratoj tiutempe vidis de proksime la publikan agadon de sia nova frato, nur *tri* el ili estis liaj *instruantoj* en la strikta senco, – kaj *tri* lumantoj estas necesaj, se *nova ringo estu enforĝata en la oran ĉenon*, kiu ekde la unuaj tagoj de tiu ĉi homaro devas renovigi sin en ĉiu generacio. – – –

La aŭtoro de tiu antikva sciigo, kiun oni nomas la „*evangelio laŭ Johano*“, sciis pri ĉiuj ĉi aferoj kaj parolis al homoj, kiuj el sekreta instruado konis multon de tio.

Lia mesaĝo *premisas* la scion pri la alta *instruo* de l' majstro, kaj kvankam la instruo eklumas por *sciantoj* el ne malmultaj paroloj en ĝi entenataj, ĝi tamen estis ankoraŭ sufiĉe dense vualita al *eksteruloj*. Kaj *vualadon* postulis la spirita leĝo en tiu tempo.

Sed ankaŭ en la agado de la *spirito* estas tempoj de *fluso* kaj tempoj de *malfluso*: – tempoj de *vualado* kaj de *malkaŝo*.

Hodiaŭ do estas eble *paroli* tie, kie oni antaŭe devis *silenti*.

Sed eĉ *hodiaŭ* ne ekzistas danĝero, ke eble *nevokitoj* povus proksimigi sin al la kvieta templo de dia kaŝiteco.

Kiuj scias *trovi* la vojon al tiu templo, estos ĉiam nur la elektitoj, kiuj *el plej pura koroardo* serĉas, ĝis la sopirita *gvidado* doniĝas al ili *en la propra „mi“*. –

Io mistere kaŝita senvualiĝos al ili, sed kio ajn *malkaŝiĝos* al tiu ĉi homaro en la fluo de la jarmiloj, tio montros pli kaj pli profundan *sekreton* en la malproksimo, kaj neniam la Dieco lasos sin al la tera homo kiel objekton de *intelekta ekkaptado*. – –

Nur *bildo* kaj *parabolo* povas alporti sciigon pri la fina vero!

Sed kiu serĉas tiun veron ne plu *ekstere*, kaj ekkonis, ke ĝi povas fariĝi ekkaptebla al homoj „*okulon ĉe okulo*“ nur en la *plejinterno de l' interno*, al tiu montros bildo kaj parabolo *vojon* kaj *manieron veni* en la plejinternon de la interno.

Se li estas vokito, tie povas ankoraŭ malfermiĝi al li multo, kiun mi tie ĉi, kaj antaŭ ĉiu homa orelo, devas *prisilenti*: – ĉu pro tio, ke homaj vortoj ne kapablas ampleksi la vastecon de tio direbla, – ĉu pro tio, ke tia scio utilis al neniuj, kiu ne ricevas ĝin el la *plejinterno*, kie sola ĝi povas fariĝi ekkaptebla *por li*.

Tio, kion mi devas diri, estas ekzakte ĉirkaŭlimigita al mi mem.

Mi povas provi prezenti nur tion, kion mi estas *komisiita* prezenti, por ke la *lumoj* denove trapenetru la tenebron.

En tiu ĉi tempo ĉiuloke ekzistas multaj, kiuj sopiras lumon – *multe pli ol iam en antaŭa tempo* – kaj hodiaŭ la skribita vorto, kiu sola povas kun certeco atingi ilin, ne plu riskas esti ŝanĝata per *kopiado* kaj tiumaniere *falsata*.

Bone estas al ili ĉiuj, se miaj vortoj trovas iliajn *korojn* kaj forŝiras ilin el la *mallumo*, por ke ili atingu la *vojon* kreitan de la plej alta *amo*, kaj tiel la *releviĝon en si mem!* – –

\*

## La mesaĝo

Remeti la malnovan mesaĝon en la *originan formon* ne estas eble eĉ al homo spirite vidanta. Sed al li montriĝas la origina *enhavo* en spirita vidado de ĝia praa *signifo*, kaj tute ne en *vortoj* de tiu antikva *lingvo*, en kiuj la *originalo* prezentis ilin. – Spirita vidado, kiu estas atingebla nur ĉe atentaj – eĉ preskaŭ superatentaj – sensoj, postulas de la vidanto, kiu per sia tera fenomenaj formo estas ankoraŭ ligita al la leĝoj de tiu ĉi tero, tiom supermezure grandajn *fortojn* por firme teni sian *direktiĝon* al tio videbla, ke la *valoro* de la rezulto estus en nenia proporcio kun la klopodado bezonata por atingi tiun rezulton, se oni volus reprodukti la originan *sencon* de la tuta originalo en seninterrompa sekvo. Nur la malmultaj, kiuj konas tiun vidadon el propra *sperto* – kaj nur tiuj el la „*lumantoj de la pralumo*“, kiuj ankoraŭ agadas sur tiu ĉi tero en sia tera korpo, kapablas vidi tiamaniere – scias pri la fortokonsumado dum jaroj, kiu estas antaŭa kondiĉo por ekvidi en la helo de la *propra spertado* tion, kion homa spirito de la pratempo portis en si, kiam ĝi penis formi sian verkon. –

Tio, kio estas vidata en *interna spertado* – ne *de ekstere* – devas tiam trovi novan formon en la vortoj de la vidanto, por montri en ties propra maniero de parolado la *veran opinion*

de la *unua* forminto, en formo kiu estas alirebla al la homoj de lia tempo, eĉ se li tute ne rezignas la uzon de tiuj vortoj, kiujn li vidas konservitaj en la tekstfragmentoj de la *origina* formo.

Tiuj, kiuj rigardas „la vorton de la Skribo“ kiel „*dian*“, suspektus nur sakrilegian „*falsigon de la Skribo*“, kaj tiuj aliaj, kiuj jam scias el propra esplorado, kio la *vero* estas pri la „*dieco*“ de la antikva, ege distordita teksto, tamen taksus novan redonon, kiu, sen ekstera „pruvo“ por siaj eltrovaĵoj, devus esti konfesata kiel la rezulto de *spirita vidado*, plejfavoraokaze kiel revaĵon. –

En tiu ĉi libro mi tamen *devos* redoni – kvankam nur fragmente – kelkon el la malnova teksto, kaj mi redonos ĝin tia, kia ĝi senvualiĝas al la vidanto laŭ la *senco*. Sed estas malproksima de mi la intenco tuŝi la *pian kredon*, kiu *feliĉigas* la naivan kredanton kaj – se li indas – eĉ en la plej stranga formo povas konduki lin al la *vero*.

Same malproksima al mi estas la malsaĝa deziro rekomendi la enhavon de tiu ĉi libro al la *erudicia esploristaro*, kvankam mi trovas en mi mem bonajn kaŭzojn por tie ĉi esprimi, ke tre probable ankoraŭ atendas sian trovonton kelkaj antikvaj manuskriptoj, per kiuj la ĝusteco de miaj redonoj povos iam esti konfirmata ...

Tie ĉi estu nun unue montrate, kiel la fervoruloj de la nova kulto, en kies manojn la malnova *mesaĝo* iam falis, sciis senskrupule manipuli tiun tekston.

La nekonata aŭtoro de tiu mesaĝo estis iam – laŭ la *senco* – skribinta:

„EN LA KOMENCO ESTAS LA *VORTO*, KAJ LA *VORTO* ESTAS *EN DIO*, KAJ *DIO* ESTAS LA *VORTO*.

ĈIO HAVAS EKZISTON NUR EN *LI*, KAJ *APARTE* DE *LI* *NENIO* ESTAS EN EKZISTO: EĈ NE TIO PLEJ MALGRANDA.

EN *LI* ĈIO HAVAS *VIVON*, KAJ *LIA VIVO* ESTAS LA *LUMO* DE LA *HOMOJ*.

LA *LUMO BRILAS* EN LA *MALLUMO*, KAJ LA *MALLUMO* *NE* *POVAS* *ESTINGI* ĜIN.

ĜI ESTAS *EN* LA *MONDO* KAJ LA *MONDO* *ESTIGIS* *EL* ĜI, SED LA *MONDO* ĜIN *NE* *EKKONAS*.

ĜI ESTAS EN *SIA* *PROPRAJŜO*, SED ĜIAJ *PROPRULOJ* *NE* *AKCEPTAS* ĜIN.

SED AL ĈIUJ, KIUJ ĜIN *AKCEPTAS*, ĜI DONAS LA *POTENCON* *FARIĜI* *GENERITOJ* *DE DIO*: KIUJ *NE* *ESTAS* *GENERITAJ* *EL* *SANGO*, *NE* *EL* LA *VOLO* *DE* *VIRINO*, *NE* *EL* LA *VOLO* *DE* *VIRO*, SED *GENERITAJ* *EL* *DIO*, *EL* LA *PLENECO* *DE* *GRACO* *KAJ* *VERO*.“

En la originalo, tie ĉi la kunteksto estis interrompita de *nenio* alia, kaj la intenco de la aŭtoro estis nur, doni per tiuj ĉi vortoj – kiuj tenis sin plej strikte al la tiutempe disvastiĝinta instruo pri la „*logos*“ – al la fideluloj, al kiuj lia mesaĝo estis direktita, klaran atentigon pri tio, en kiu senco ili komprenu tion sekvontan.

*Nur tiam* li komencas utiligi siamaniere la rakonton pri la *baptisto*, kiun li jam estis trovinta en la malnovaj skriboj, ĉar li ne nur estis en *kontraŭa* rilato al la *disĉiploj de la baptisto*, kiuj tiutempe ankoraŭ ekzistis, sed ankaŭ volis montri al la siaj, ke nek la severa *asketismo*, kiun la baptisto kiel sendito de mistika sekto estis iam predikinta, donas la savon, nek la *bapto per akvo* de la *nova kulto*, kiu nomis sin laŭ la alta

*majstro*. Krome li volis kontraŭi la *eraron*, ke la alta majstro – kiel pli malnova legendo asertis – unue estis *disĉiplo* de la baptisto, antaŭ ol li mem komencis instrui.

Tial li diras, ke la diŝiploj de la *baptisto* forlasas tiun ĉi, kiam li mem devas konfesi, ke li baptas per akvo, sed ke tiu *Jehoŝuah* scias bapti per *spirito*.

La originala teksto diris – laŭ la *senco* – tion ĉi:

„ESTIS HOMO, KIU NOMIĜIS *JEHOĤANAN*.

KAJ TIO OKAZIS EN BETANIO, TRANSE DE JORDANO, KIE JEHOĤANAN BAPTADIS.

JEHOĤANAN DIRIS:

*MI* BAPTAS PER *AKVO*, SED MEZE DE VI ESTAS UNU KAJ VI NE KONAS LIN: *TIU* BAPTOS PER *SPIRITO!*

*MI* NE SENTAS MIN INDA EĈ NUR MALLIGI LA RIMENOJN DE LIAJ SANDALOJ.

ALIAN TAGON JEHOĤANAN STARIS KUN DU EL SIAJ DISĈIPLOJ.

KAJ VIDANTE *JEHOŜŬAHN* PRETERIRANTAN, LI DIRIS: *ĈI TIU ESTAS LI!*

*MI* MEM NE KONIS LIN, SED TIU, KIU ORDONIS AL MI BAPTI PER AKVO, DIRIS AL MI:

KIAM VI VIDAS UNUN, AL KIU MALSUPRENIRAS *SPIRITO* KAJ ĜI *RESTAS* EN LI: TIU ESTAS LI, KIU VENOS POR BAPTI PER *SPIRITO*.

KAJ JEHOĤANAN ATESTIS KAJ DIRIS:

*MI* VIDIS SPIRITON MALSUPRENIRI SUR LIN KIEL KOLOMBO MALLEVIĜAS, KAJ LA *SPIRITO* RESTIS EN LI.

## KAJ LA DU DISĈIPLOJ AŬDIS LIN DIRI TION KAJ SEKVIS JEHOŜŬAHN.“

Se la *originalo* hodiaŭ estus metita antaŭ tradukisto, tiu ĉi eble povus doni al la frazoj alian *formon*, sed tute ne povus alveni al alia *signifo*.

La aŭtoro de la malnova mesaĝo *tute ne* intencis, ke la formo, en kiu li donis la rakonton, kongruu kun la raportoj, kiuj penis fari el ĝi la konfirmon, ke la baptisto ekkonis en la majstro la „*Mesion*“ kaj deklaris lin kiel tia. En la originalo tie ĉi mankas ankaŭ multo, kion oni samloke trovas en la hodiaŭa, tradicia formo de la teksto.

Sed kio tie ĉi *mankas*, estas en la tradicia teksto *aldonaĵo* fare de la *samaj* cerboj, kiuj sciis ŝanĝi la originalon tiumaniere, ke la baptisto estas menciita jam en la *komenco* de la mesaĝo.

En plej diversa maniero ili klopodis adapti la originalon al la pli fruaj raportoj sanktaj al ili.

Kio en la unua tempo de la nova kulto nomiĝis „kopio“, tio estis nenio alia ol *parafrazo*, kaj ĉiu skribanto faranta novan kopion opiniis tute bona kaj ĝusta ŝanĝi la tekston tiel, ke ĝi fariĝis *subtenilo por lia propra kred-opinio*.

Tiumaniere la teksto de la tuta mesaĝo estis ofte aliformigata, antaŭ ol estiĝis *tiu* teksto, sur kiu baziĝas ĉiu hodiaŭa, tradiciita formo.

Oni povas *bedaŭri*, ke la originalo *ne* estas *konservita*, sed oni ne provu – motivita de siaj deziroj – laŭeble *savi* tion hodiaŭ tradiciitan, sed oni devas fine kompreni, ke *multe pli* de ĝi estas *ŝanĝo* kaj *aldonaĵo*, ol la kvanto, kiu ankoraŭ portas originajn trajtojn.



Nur tiu, kiu estos enpreninta en sin la *instruon*, kiun la alta *majstro* donis al la fideluloj, kaj kiu estis ankoraŭ viva en la malgranda rondo, al kiu tiutempe la teksto de la originalo estis direktita, – eksentos kun plena certeco, kio ankoraŭ portas la *stampon de la originalo* kaj kio estas pia *falsaĵo*.

Tiom longe, ke oni ne sukcesas trovi bone garditajn antikvajn tekstojn, kiuj estas *pli proksimaj* al la originalo ol tio hodiaŭ tradiciita, tiu ĉi estos la sola vojo por atingi klarecon.

\*

## La pura instruo

La *pura instruo* de la alta majstro, kiun li donis sole *nur al la fideluloj*, etendiĝas vere pli foren ol la instruoj de *etika* naturo, kiujn li parolis antaŭ la *tuta popolo*, kaj ol tiuj, kiujn oni pli malfrue elprenis el la skriboj de la „paganaj“ saĝuloj por atribui ilin al la alta majstro, kvankam tiu ĉi ne uzis ilin.

Tiu pura instruo ne estis la frukto de lia *pensado*, kaj ne en pia *ekstazo* li estis ricevinta ĝin.

Kion li havis por doni al la malmultaj fideluloj, por ke ili ekkaptu „*la misteron de la regno de Dio*“, tio originis el la saĝo de la spirita komunumo, al kiu li apartenis.

*Praantikvan, sanktan scion* – kiu estas, al ĉiu el tiuj, kiuj en tiu ĉi surtera vivo ricevas ĝin en si mem kiel membroj de la spirita komunumo, kaptebla nur en *plej maldorma* spertado – li formis en *sia* maniero kaj en *sia* lingvo, same kiel *ĉiu* el „*tiuj sciantaj per memtransformiĝo*“ povas konigi ĉiam nur la saman *veron*, en bildoj kaj en lingvo, kiuj alproprigi al li mem, kvankam en tiu lingvo kaj en tiuj bildoj eble returniĝas kelkaj formoj de malnova stampo.

Tiel li sciis enkonduki la disĉiplojn, kiuj povis sekvi lin, en la plejinternon de la esto kaj peri al ili imagon pri *Dio*, kiu esence diferencis de la publika pastra instruo.

Li parolis al homoj, kiuj ne estis vizitadintaj altan lernejon kaj al kiuj sufiĉis, kiam li diris al ili pri la *Prahumo*, kiu parolas sin mem kiel *Pravorton*:

„*DIO ESTAS SPIRITO, KAJ KIUJ ADORAS LIN, TIUJ DEVAS EN LA SPIRITO ADORI LA VERON.*“

Sed kion li nelacigeble penis montri al la fideluloj, tio estis la vojo por *eniri* en la *regnon de la spirito*, en kiu estas „multaj loĝejoj“ – multaj diversspecaj ebloj de spertado – depende de la alteco de la perceptomaniero, al kiu tio spirita de la homo, vekite, povas levi sin.

Kiam la majstro parolas pri la „regno de Dio“, tiu ĉi esprimo havas ne ĉiam la saman *sencon*.

Li ja diras, ke la regno de la ĉieloj estas *en la homo*, sed li ankaŭ diras, ke povas „*vidi*“ la regnon de Dio neniue, kiu ne estas „*denove naskita*“. Tie ĉi konfuziĝo povas esti evitata nur, se oni scias, ke unufoje temas nur pri la *speco* de la homspirito, kiu latente entenas la *eblon sperti*, per kiu la regno de la spirito povas fariĝi al li *certaĵo*, sed *sen* la kapablo senti sin en la plej altaj regionoj de spiritaĵo mondoj *konscie kiel tie ĉi en la tera vivo* kaj ankoraŭ *dum* tiu ĉi tera vivo, – kaj aliafoje pri la *plej alta celo* de la homspirito: celo kiu konsistas en tio, ke li *post* tiu ĉi tera vivo, kaj eble nur post *longa* preparado en la spirita mondo, atingas novan *vivoformon*, en kiu li povas sperti sin mem, *konscie kaj agante*, en la *plejinterno* de la spirita regno.

Tie ĉi, *diferencaj*, intersekvantaj *statoj* devas esti atentataj.

La unua estas la *veko* de la homspirito el ĝia dormo en la homa animalo, per kio ĝi, vekigante el la nokto de neekkonado, *iomete eksentas*, ke ĝi *ne estas de tiu ĉi tero*: ke

ĝi originas el vivoregno, en kiu la vivo estas formata laŭ *aliaj* leĝoj, ol tie ĉi en la *tera* fenomenaj mondo. –

El tio rezultas kiel dua stato la strebado renkonte al la *pralumo*, el kiu la vivo de la homspirito, plue gvidate ŝtupon post ŝtupo fare de la hierarkie ordigita vivo de la spirito, finfine troviĝas en la eterna esto.

Tiu strebado renkonte al la *pralumo* povas trovi *plenumiĝon* ankoraŭ dum tiu ĉi surtera ekzistado, per tio, ke „*spirita fajrero*“, aŭ radio el la *pralumo* – kondukate malsupren tra ĉiuj hierarkiaj ŝtupoj de spirita vivo – kreas *spiritan organismon* en la homspirito el ties animoelementoj, per kiu la homspirito trovas sin *unuigita* kun tiu dia „*spirita fajrero*“ aŭ „radio“ de la *pralumo*, kiun fajreran aŭ radion ĝi ekkonas kiel sian „*vivantan Dion*“.

Nun fariĝis al ĝi plej sekura *certaĵo* tio, kio antaŭe estis nur *malklare sentata*: – la homspirito estas *konscia* pri sia vivo en la *spirito* kaj el la spirito!

Sed ĝi estas ankoraŭ *tute ne kapabla eniri konscie kaj agante* ankaŭ tiun altan spiritan regnon, el kiu ĝi iam malligis sin mem per la inklino de sia volo en tiu „falo“ el alta lumado, kiu ligis ĝin al tiu ĉi *tera* fenomenaj mondo. –

Por tio estas necesa *io alia*, kaj kvankam ĝi iam *ne* plu portas la teran formon kaj trovas sin, post la morto de sia tera formo, konscia kaj viva en la pli malaltaj regionoj de spirita vivo, tamen tiu *plej alta, plej interna* el la spirita fenomenaj regnoj – „la regno de Dio“ en la *plej alta* senco – restas fermata al ĝi tiom longe, ĝis ĝi „estas denove *naskata*“ en tiu regno: nove generata el *spirita* semo – el la praakvoj de la vivo en la *spirito*.

„Naskiĝo“ en la *teran* fenomenan mondon estas la frukto de la plugenerado de *animala* vivo kaj *sola* ebligas konscion kaj agadon en tiu ĉi *tera* fenomenaj mondo.

Kiu ne estas *naskita* en ĝin, ne aliamaniere povas en ĝin eniĝi: – ĝi ne estas malfermita al li, eĉ se li scius pri ĝi.

Tiel same homspirito ne povas eniĝi en iun el la *spiritaj* fenomenaj mondoj – kaj ĉio, kio vivas en la regno de la spirito, estas reciproke ekkonebla nur kiel spirita *fenomeno* – se ĝi ne estas *naskita en ĝin*.

Origine la homspirito estas de eterne „naskita“, generita el Dio, en tiun plej internan „regon de Dio“, – sed postlasis la spiritan, *el Dio naskitan* organismon – se paroli per tiu ĉi bildo – en la plej interna regno de la spirito, kie ĝi rekunfandiĝis kun la forto de la Dieco. Tial devas okazi individua „renaskiĝo“, se la homspirito povu iam trovi sin *konscia kaj aganta* en tiu „*regno de Dio*“. Antaŭe la homspirito, eĉ se ĝi plej alte *disvolviĝis* per la surtera vivo, estas konscia nur pri *si mem* kaj pri sia *vivanta Dio*, kaj post la „morto“ de la tera korpo trovas sin nur en tiuj *malaltaj* spiritaj mondoj, kies organismo konserviĝis al ĝi kiel ĝermo, eĉ *post* ĝia falo en la animalan fenomenan mondon; tiu ĝermo estas tio *sola* spirita, kion ĝi tie ĉi ankoraŭ posedas kaj povas disvolvi per sia sintenado en la surtera vivo.

Nur pri tiu plej alta kaj lasta celo la aŭtoro de la malnova mesaĝo citas la majstron jene:

„SE HOMO NE ESTAS *DENOVE NASKITA* EL LA AKVO EN LA *SPIRITO*“ – EL *SPIRITA* SEMO –, „LI NE POVAS *ENIRI* EN LA REGNON DE DIO.“

Kaj por certigo kaj pliklarigo li plue citas la majstron:

„TIO, KIO NASKIĜAS EL LA *KARNO*, ESTAS *KARNO*;  
KAJ TIO, KIO NASKIĜAS EL LA *SPIRITO*, ESTAS  
*SPIRITO*.“

Por ke estu nenia dubo pri tio, ke tie ĉi okazas la estigo de  
*reala organismo*, kiel el la karno, tiel el la spirito ...

Sed la solaj homoj sur tiu ĉi tero, al kiuj doniĝis tiu ĉi  
„nova naskiĝo“ en la spirito jam *dum* ilia surtera vivo, kaj  
kiuj tial, *samtempe* kun ilia kapablo sperti la *teran*  
fenomenan mondon, konscie vivas kaj agas en la plej interna  
regno de la *spirito*, estas la *lumantoj de la pralumo*, al kiuj  
apartenis la alta majstro el Nazareto. –

Nur tia homo vere kapablas diri pri si kaj siaj fratoj:

„NI PAROLAS TION, KION NI *SCIAS*, KAJ KION NI  
*VIDIS*, TION NI ATESTAS.“

Aŭ tiun alian vorton, kiu pli malfrue estis enmetita en  
aldonitan rakonton kaj tie estas apenaŭ plu ekkonebla:

„*VI ADORAS TION, KION VI NE SCIAS, SED NI  
SCIAS, KION NI ADORAS*.“

Same kiel la alta majstro, ĉiu el la *lumantoj de la pralumo*  
devas atesti:

„MI KAJ LA PATRO ESTAS *UNU*. KIU VIDAS *MIN*,  
TIU VIDAS ANKAŬ LA *PATRON*.“

Ĉar la „Patro“ en la pravorto havas *neniun alian*  
memmanifestiĝon sur tiu ĉi tero, ol la *lumanton de la*  
*pralumo*, kiun li preparis al si kiel sian memmanifestiĝon, kaj  
al kiu li, dum la lumanto vivas en sia *tera* korpo, donis el si la  
*spiritan formon*, kiu igis lin konscia en la *spirita* fenomena  
mondo, sen forpreni lin el tiu ĉi tera mondo. –

Li vere fariĝis „*filo*“ de la „*Patro*“, „*filo*“ „*ennaskita*“ en  
la pravorto! – – –

El sia konscia memspertado kiel spirita „filo“ de la eterna spirita „Patro“ en la pravorto: – el sia konscio en la *spirita* fenomenaj mondo, – la alta majstro eldiras la puran instruon.

„VI JA MIN *KONAS*, KAJ VI *SCIAS*, *DE KIE* MI ESTAS; SED MI NE VENIS *DE MI MEM*“ – NE TIO, KIO MI ESTAS LAŬ *TERA* DEVENO, RAJTIGAS MIN INSTRUI KAJ PAROLI AL VI TIUMANIERE – „SED *SENDIS* MIN UNU, KIU ESTAS *VERA*, UNU, KIUN VI NE *KONAS*.“

„KVANKAM MI ATESTAS *PRI MI MEM*, TAMEN MIA ATESTO ESTAS *VERA*, ĈAR MI *SCIAS*, DE KIE MI VENIS KAJ KIEN MI IRAS.“

„JES, TIU KIU MIN *SENDIS*, ESTAS *KUN MI* KAJ LI *NE LASAS* MIN *SOLA*, ĈAR MI ĈIAM *FARAS* TION, KIO *PLAĈAS* AL LI.“

Kaj estante plej nerefuteble certa, ke li en sia ĉirkaŭaĵo estas la *sola*, kiu scias, kio estas necesa, por ke la tera homo iam, „en sia lasta tago“ en tiu ĉi fenomenaj mondo, trovu sin preparita por eterna „naskiĝo“ en la *spiritan* fenomenan mondon, li parolas la potencan vorton:

„MI ESTAS LA *VOJO* KAJ LA *VERO* KAJ LA *VIVO*. NENIU VENAS AL LA *PATRO* KROM PER *MI*.“

Ĉar tio generita el la *spirito*, kion li nomas la „filo“ kaj kiel kion li spertas *sin mem* kiel lumanton de la *pralumo*, estas la *samo* por ĉiu homspirito, kaj *en ĝi sola* doniĝas al la homspirito *nepereonta vivo* en la *spirita mondo*.

Tiun ĉi vivon spertas li mem, kaj pri ĝi li povas eldiri:

„TIO, KION MIA PATRO DONIS AL MI, SUPERAS ĈION, KAJ NENIU POVAS ĜIN FORKAPTI EL LA MANO DE MIA PATRO.“

Sed *ne por si mem sola* li volas esti en la nepasema *vivo*, kaj do li parolas la vorton:

„KIU KREDAS AL *MI*, TIU KREDAS NE AL *MI*, SED AL *TIU*, *KIU MIN SENDIS*.

MI VENIS KIEL *LUMO* EN LA MONDON, POR KE ĈIU, KIU KREDAS AL MI, *NE RESTADU EN MALLUMO*.

ĈAR MI *NE* PAROLIS *DE MI MEM*; SED LA *PATRO*, KIU SENDIS MIN, *ORDONIS* AL MI, *KION* MI PAROLU KAJ INSTRUU.

KAJ MI *SCIAS*, KE LIA ORDONO VENAS EL ETERNA VIVO.

KION DO MI PAROLAS, MI PAROLAS *TIEL*, KIEL LA PATRO *DIRIS* AL MI.“

Sed kiel en la lumanto de la pralumo, jam en tiu ĉi tempo de surtera vivo, la „*Patro*“ *mem manifestiĝas* en la „*filo*“, – kiel la lumanto spertas sin *mem* kiel „*filon*“ de la eterna „*Patro*“, de la plej alta estro de ĉiuj lumantoj surtere, *el* kiu kaj *en* kiu ĉiu membro de tiu ĉi spirita komunumo vivas en absoluta *unuiĝo*, – tiel estas ekkonata trae de li nur la „*Patro*“, la pragerita *homo de la eterneco* en la *pravorto*, en *terhoma* manifestiĝo. – –

„KIEL LA PATRO HAVAS *VIVON* EL *SI MEM*, TIEL LI DONIS ANKAŬ AL LA FILO, KE ĈI TIU HAVU *VIVON* EL *SI MEM*.“



Sed same kiel Moseo levis la kupran serpenton en la dezerto, por ke ĉiu, kiu fidante ekrigardas ĝin, resaniĝu, tiel ankaŭ en la homo de tiu ĉi tero la bildo de la „Filo de homo“, de la lumanto, devas esti „levata“ super ĉion alian, kun la fidanta konscio pri la vero, ke estas la *pralumo mem*, kiu en sia mem-elparolo kiel *pravorto* „parolas“ la eternan, prageneritan *homon de la spirito*, kiu eterne restadas en sia lumgeneriteco en la pravorto, kaj fariĝas „*Patro*“ al la lumantoj, por ke pere de ili la homspirito sur tiu ĉi tero ricevu sciigon pri sia prahejmlando kaj pri la vojo kiu kondukas returne al ĝi. –

„KIEL MOSEO LEVIS LA SERPENTON EN LA DEZERTO, TIEL LA FILO DE HOMO“ – LA SCIIGANTO EL LA REGNO DE LA SPIRITO KAJ LA SCIIGO, KIUN LI ALPORTAS – „DEVAS ESTI LEVATA, POR KE ĈIUJ FIDANTAJ AL LI NE PERDIĜU“ – EN EONLONGA NOKTO DE NEEKKONADO – „SED HAVU LA VIVON.“

Kaj refoje, por montri, ke doniĝas *konfirmo* nur al tiu, kiu *fidas* al la lumantoj de la pralumo tiel, kiel tiuj volontaj resaniĝi devis *fidi* al la mirakla serpento de Moseo, la aŭtoro de la malnova mesaĝo citas la majstron:

„KIAM VI ESTOS *LEVINTAJ* LA FILON DE HOMO, TIAM VI SCIOS, KE MI *ESTAS*, KAJ KE MI FARAS *NENION EL MI MEM*“ – KIEL TERA HOMO, LAŬ MIA HOMA ARBITRO – „SED PAROLAS TION, KION MIA *PATRO INSTRUIS* MIN.“

Ree kaj ree estas emfazate, ke la *lumanto de la pralumo*, en kiu la plej alta *spirita* spertokapablo trovas *manifestiĝon*

sur la tero en homo de tiu ĉi tero – kiu scias *unuigi* la plej altan *spiritecon* al la *animalo* – , ne instruas sian propran *terhoman* saĝon, sed parolas el la abundo de ekkonado, kiun malkaŝas al li la „*Patro*“.

„MIA INSTRUO ESTAS NE *MIA*, SED *TIES*, KIU MIN *SENDIS*. SE IU VOLAS AGI LAŬ *TIES* VOLO, TIU *EL SIA INTERNO EKSCIOS*, ĈU TIU ĈI INSTRUO ESTAS EL DIO, AŬ ĈU MI PAROLIS EL MI MEM.“

Do, *kondiĉo* por ĉiu *konfirmo* de l' instruo de la lumanto estas, ke la disĉiplo ne nur ekkonu la nemezureblan gravecon immanentan en la fakto, ke mortema homo povas alporti sciigon pri la plej interna *regno de la spirito*, sed ankaŭ ke li *agu* laŭ la leĝoj de la spirito, pri kiuj la lumanto venas sciigi nur laŭ la „*volo*“ de sia „*Patro*“ kaj en *akordo* kun li. –

Sed la agado de la lumanto ne limiĝas je tiu ĉi ekstera, *fiziksense* perceptebla fenomeno mondo.

Li agadas tiel same en la plej interna *regno de la spirito* – en la *regno* de *kaŭzoj* – kiel sur tiu ĉi tero, kiel ankaŭ en tiuj *malaltaj* spiritaj mondoj, kiujn eniras la homspirito kiam ĝi *forlasas* la teron, kaj pri tiu ĉi agado li sciigas per la vortoj:

„VENAS LA HORO KAJ JAM *ESTAS*, KIAM LA *MORTINTOJ* AŬDOS (PER MI) LA VOĈON DE LA *FILO*; KAJ LA *AŬDINTOJ VIVOS*“ – ĈAR LA LUMANTO POVAS *LEVI* ILIN: POVAS PREPARI ILIN POR LA *NOVA NASKIĜO* EN LA SPIRITO, KIUN FAROS LA *PATRO*. – –

Sed por ke oni ne kredu, ke li kiel „*Filo*“ de la *Patro* agadas libere laŭ sia *arbitro*, li diras:

„LA *FILO* NE POVAS PER SI MEM *FARI ION*, KROM TIO, KION LI *VIDAS* LA *PATRON FARANTA*; ĈAR KION

AJN TIU ĈI FARAS, TION LA FILO *TIEL SAME* ANKAŬ FARAS.

NENIU POVAS VENI AL MI, SE LA *PATRO*, KIU MIN SENDIS, NE TIROS LIN AL MI; POR KE MI VEKU TIUN EN LIA LASTA TAGO.“

Sed al *neniu* homspirito povas doniĝi la daŭranta *vivo* en la regno de la spirito, se ĝi ne *kredas*, ke ĝi *trovos tiun ĉi vivon*.

Kaj sole pri tiu ĉi *kredo*, kiu devas esti memcerta *fido*, la majstro iam parolis rilate sian instruon, kiu alportis *ĉiun certecon el la spirita mondo* tra la buŝo de *homo* sur *tiun ĉi teron*:

„*JEN LA PANO, KIU MALSUPRENIRIS DE LA ĈIELO, POR KE TIU, KIU MANGĜAS EL ĜI, NE MORTU.*“

Tiu ĉi vorto iam troviĝis en la sama loko, kie estas dirite:

„*KIU KREDAS AL MI, EL TIES KORPO FLUOS RIVEROJ DA VIVA AKVO.*“ – LI MEM *PLUGENEROS* EL SI ION SPIRITAN EN LA *SPIRITA* FENOMENA MONDO, ĈAR TIE ĈI LA PAROLO ESTAS PRI LA „*KORPO*“ DE TIU *SPIRITE NASKIĜINTA*. – –

Kaj pri la sama „*korpo*“ de tiu *spirite naskiĝinta* la majstro tie diris, ke tiu ĉi „*korpo*“ en la *spirita* fenomena mondo estas tiom „*reala*“ kiom „*karno*“ kaj „*sango*“ en tiu ĉi *tera* fenomena formo, tiel ke nur *tiu* povas havi konscian *vivon* en la spirito, kiu *ekposedis* tiun ĉi *spiritan* korpon.

„*SE VI NE AKIROS LA KARNON DE LA FILO DE HOMO* KAJ LIA SANGO NE ESTOS *EN VI*, VI NE HAVOS EN VI LA *VIVON*.“

Ĉio, kio en la hodiaŭa tradicia formo de la mesaĝo nun troviĝas en la loko, kie la parolo pri „pano“ intermiksiĝas kun la parolo pri „karno“ kaj „sango“, estas pli malfrua *transformaĵo* kaj bone konsiderita *aldonaĵo*.

Oni trovis la vorton pri la *spirita* „korpo“ bone taŭga por doni apogon al la nova *kulto*, kiu estis origininta el la kultaj kutimoj de mistikaj kredkomunumoj, tiutempe ĉie konataj en oriento.

Oni do transformis la vortojn de l' majstro tiumaniere, ke ili ŝajnis temi pri liaj propraj, *teraj* karno kaj sango kaj ne pri tio, kio en la plej interna regno de la spirito estis al li portanto de lia *spirita* konscio, kiel tie ĉi surtere karno kaj sango portis lian *teran* konscion. — —

Oni en la kopio tiam ripetis tiun ĉi propran kredopinion per plej diversaj parafradoj, samtempe intime ligante ĝin kun la vortoj pri la „pano el la ĉielo“ per sama parafrado.

Certe ekzistis pli malfrue inter tiuj, kiuj formis la liturgion kaj ritojn de la nova kulto, kelkaj homoj alte iluminiĝintaj kaj „sciantoj“, sed ili jam devis kalkuli kun *tio ekzistanta* kaj provis ŝanĝi per *interpretado* la valoron de tio, kion ili trovis enradikiĝinta kiel fremda kultmaterialo.

Sed iuj el ili finiĝis kiel elpelitaj „*herezuloj*“, dum la interpreto de la aliaj estis akceptata nur tiom, kiom ŝajnis eble *sen* endanĝerigi la instruojn transprenitajn el malnovaj paganaj kultoj, instruojn, al kiuj la kulta rondo ŝuldis sian mistikan aŭreolon.

Sed vere ne estas „hazardo“, ke eĉ la hodiaŭa ekzistanta mesaĝoteksto *sola* scias nenion pri tiuj vortoj de la tri pli malnovaj raportoj, kiujn ili igas la majstron paroli ĉe la lasta paskofesta manĝo kaj kiuj fariĝis apogo de la sama kulto. — —

Sed ĝuste tiu aŭtoro, al kiu oni estis sukcesinta subŝovi la falsajn majstroparolojn pri liaj teraj karno kaj sango: – pri lia „karno“ kiel „vera manĝaĵo“ kaj lia „sango“ kiel „vera trinkaĵo“, – certe estus doninta *plej solenan konfirmon* al tiaj paroloj en sia priskribo de la paska manĝo, se *unu sola* eldiro kun eĉ nur *simila* senco estintus raportita de li mem en la falsita loko!

Sed li sciis tre bone, ke tie ĉi imagoj el malnovaj *paganaj kultoj* estis estigintaj al si novan vivon en la nomo de la alta majstro.

— — —

Ĝuste en *tiu ĉi* punkto la *spirita* spertado, en kiu li vivis kaj volis firmigi la siajn, *diferencis* disde la instruo kaj la ekstera kulto, kiuj volviĝis ĉirkaŭ la nomo de la majstro kaj en la tempo, kiam la aŭtoro skribis sian mesaĝon, jam havis kelkajn sukcesojn, ĉar ili klopodis ĉiamaniere *asimili* la instruon de la majstro al tiu de la mistikaj kultkomunumoj, kiujn oni tiam ĉiuloke estis trovintaj en ekzisto.

La tuta malnova mesaĝo estas komprenebla nur, se oni scias, ke ĝi estis skribata por montri la *kontraŭecon*, kiu ekzistis inter la *pura instruo* de la alta majstro, instruo, kiun ĉiutempe povis ekkapti nur malmultaj, kaj la nova *kredopinio*, kiu pli kaj pli katenis la mensojn kaj kiu disvastiĝis ne plej malmulte pro tio, ke ĝi sukcesis unuigi tion *novan* kun tio *tradicia* tiumaniere, ke ĉio, kion la tempo prezentis kiel mistikan instruon, ricevis en ĝi novan prestiĝon.

Sed ĉar tiu kredopinio enhavis kiel almiksaĵon kelkajn *parolojn de la majstro*, kiuj ankaŭ por la *disĉiploj de Johano*

estis sanktaj, la aŭtoro volis per sia mesaĝo *protekti* la *ŝanceliĝantojn* en sia malgranda spirita rondo kontraŭ la minacanta *danĝero* forfali al la ekstera kulto.

Sed tiun celon ĝi *ne* atingis por longa tempo.

La lastaj posteuloj de la disĉiploj de Johano devis cedi al la nova ekstera kulto kaj, rigardate de ties kredantoj kiel „herezuloj“, devis sin kaŝi, tiel ke jam post apenaŭ unu generacio estis trovebla plu neniu, kiu vivis en la *pura instruo*.

Kiam poste la malnova mesaĝo falis en la manojn de piaj fervoruloj de la nova kulto, jen tiu, jen alia el ili trovis kaŭzon aldoni al la teksto, kiun oni povis *bonafide* rigardi kiel verkon de la *disĉiplo Johano*, ĉion tion, kio eble faris ĝin taŭga por esti voĉlegata en la kunvenoj kiel *instrua teksto*.

En tiuj unuaj tempoj de la nova kredo, la *respekto* antaŭ la „*vorto de la skribo*“ *ne* havis la gravecon, kiun ĝi atingis pli malfrue.

*Multe pli grava* estis la *kulto* de la nova Savanto-Dio kaj la *defendado* de la kredopinio vidalvide al *judoj* kaj *paganoj*.

Do tekstoj estis senskrupule ŝanĝataj laŭ la bezonoj de la *kulto*, kiu nun provis doni novan *interpreton* al la *formoj de kultoj de antikvaj misteroj*, kaj same senskrupule judaj kaj paganaj kristanoj, kiuj konsistigis la kultan rondon, ŝanĝis tion, kio en la raportoj ŝajnis al ili *danĝera* antaŭ iliaj *iamaj samreligianoj*.

Farante tion, oni ĉiam opiniis sin nur *servanto* de la *disvastigado* de la „vera“ *kredo*, kaj finfine *aganto* plene laŭ la *intenco* de la origina aŭtoro.

Restas preskaŭ miraklo, ke *malgraŭ* ĉio *spuroj* de la origina teksto ie kaj ie konserviĝis, kvankam la *origina senco*

de tre multaj individuaj teksteroj hodiaŭ ŝajnas renversita en sian *kontraŭaĵon*.

Sed kiu fosas pli profunde kaj penas forigi la surŝutaĵon, tiu ankoraŭ hodiaŭ povas trovi tie ĉi la fundamentojn de malnova *templo*, en kiu la *pura instruo* iam trovis *plenumiĝon*, kiun la alta majstro, *kiel lumanto de la pralumo*, estis transdoninta al siaj plej proksimaj disĉiploj.

\*

## La parakleto

La alta majstro, kiu paŝis sur tiu ĉi tero kiel *la plej granda el ĉiuj amantoj*, ĉiutempe sciis tre bone, ke li povos fini la grandan agon de amo, iam farota de li, nur en la *horo de sia morto* kaj nur en *morto per homa mano*. –

Li do havis tempojn, en kiuj li sopiris al la horo de sia morto, kaj aliajn tempojn, en kiuj li pensis pri sia fino kun interna timtremo. Jen li deziris, ke lia morto alvenu, jen li esperis, ke li vivos ankoraŭ longan tempon por povi ankoraŭ longe helpi al siaj disĉiploj kaj doni al ili tion, kion ili tiutempe povis „ankoraŭ ne elporti“.

La altaj fratoj, kiujn li vizitas en ilia soleco, scias diri al li en tiuj horoj de timtremo kaj hororo nur, ke al „filo“ de la „Patro“ en la pravorto ne decas demandi pri tio estonta ...

En tiu animstato, antaŭsentante sian baldaŭan finon sen scii kiom proksima ĝi estas, li skribis el sia soleco propraman leteron al siaj fideluloj kaj sendis ĝin al la disĉiplo, kiun li amis, ĉar tiu ĉi el ĉiuj komprenis lin plej profunde, el la sentema *amo* kiu lin ligis kun li.

Tiu ĉi disĉiplo tiam devis komuniki la leteron al la fideluloj.

*Ne malmultaj* vortoj, kiun la aŭtoro de la malnova mesaĝo igas la majstron *paroli*, originas el propramanaj skriboj de la majstro, sed *tie ĉi* konserviĝis preskaŭ la *tuta teksto de la*



*letero*, kvankam ĝi pli malfrue estis disapartigata kaj poste reenmetata en lokoj pli dezirindaj laŭ la postuloj de la kredo de l' nova kulto.

En sian *originan skribon* la aŭtoro de la malnova mesaĝo estis transpreninta la tekston de la *majstrovertoj* en jena formo:

„ANKORAŬ IOM DA TEMPO, KAJ LA MONDO NE PLU VIDOS MIN.

EN TIU TAGO VI POVOS PLU NENION *DEMANDI* MIN. SED MI NE VOLAS LASI VIN ORFAJ.

MI PETOS LA *PATRON* KAJ LI *SENDOS AL VI ALIAN HELPANTON EL LA SPIRITO DE LA VERO*: UNUN, KIUN LA MONDO *NE* POVAS KAPTI, ĈAR ĜI *NE VIDAS* LIN KAJ *SCIAS NENION* PRI LI.

SED VI *EKKONOS* LIN, ĈAR LI *RESTADOS KUN VI* KAJ *ESTOS EN VI*.

LI *INSTRUOS* VIN PRI ĈIO, KAJ VIN *REMEMORIGOS* PRI ĈIO, KION *MI* DIRIS AL VI.

LI PAROLOS *NE DE SI MEM*“ – KIEL ANKAŬ *MI* DIRIS AL VI, KE MI PAROLAS *NE DE MI MEM* – „SED *KION LI AŬDAS*, TION LI PAROLOS KAJ *SCIIGOS* AL VI.

LI *KONFIRMOS* MIN, ĈAR LI *PRENOS EL TIO MIA* KAJ *SCIIGOS ĜIN* AL VI.

ĈIO, KION LA *PATRO* HAVAS, *ESTAS MIA*.

TIAL *MI* DIRAS: LI *PRENOS EL TIO MIA*.

KIU *AKCEPTAS LIN*, KIUN *MI SENDOS*, TIU *AKCEPTAS MIN*, KAJ KIU *MIN AKCEPTAS*, TIU *AKCEPTAS TIUN*, KIU *MIN SENDIS*.

EN TIU TAGO VI *EKKONOS*, KE MI ESTAS *EN MIA PATRO*.

VIA KORO NE *MALTRANKVILIĜU*. *ESTU SEN TIMO*.  
MI LASAS VIN EN *PACO*.

*MIAN PACON MI DONAS AL VI, KIUN LA MONDO NE POVAS DONI.*“

Tie ĉi estas la parolo pri nenio alia, ol ke la lumanto promesas sendi al siaj disĉiploj post sia tera morto *alian* instruanton, nome unun el la alta rondo de lumantoj de la pralumo, kiuj vivas *ne plu* en tera korpo, sed en *spirita* formo, por ke la disĉiploj povu perfektigi sin sub lia *spirita* gvidado kaj ne devu zorgi, ke li povus esti kaptata de homoj kaj forprenata for de liaj disĉiploj kiel la majstro mem.

Al tiuj vortoj li eksplicite aldonas, ke ankaŭ *tiu ĉi* spirita instruanto, kiun ili kapablas aŭdi nur *en sia plejinterno*, „*parolas ne de si mem*“ same kiel li, kaj sciigos al ili tion saman, kion ili antaŭe estis aŭdintaj el lia propra buŝo, kaj ke tiu scios preni el la trezoro de la *sama* saĝo tion, kion ricevas *el la ekkonado de la Patro* ĉiu, kiu fariĝis „*filo*“ de la „*Patro*“, kaj per tio konfirmos lin, la majstron mem.

Sed ĉar la alta majstro mem tre baldaŭ post sia morto estis fariĝinta *dio* al la kredantoj de la nova kulto, ankaŭ tiu ĉi *spirita* frato de la majstro devis tuj fariĝi *dio*.

Oni *ne* estis ekkoninta la *veran* „*triunuon*“, kiu devas esti vidata sole en tio, ke la senforma, neekaptebla kaj en si ĉion ampleksanta *Pralumo* – la senfina, senfunda eterna „*maro de la Dieco*“ – eterne malkaŝas sin mem kiel *unuecon* en la *Pravorto* – la „*Vorto*“, kiu estas „*en la komenco*“, kiu ĉiam *estis* kaj *estas* kaj *estos*: „*Dio*“ en la Dieco, – kaj ke la

*Pravorto* malkaŝas el si mem la „*Homon de la eterneco*“ – la lumgeneritan *eternan Spiritan Homon*, kiu eterne restadas en ĝi kaj, plugenerante kiel „*Patro*“, eligas el si ĉiujn spiritajn hierarkiojn, do estante en *unueco* la esenco de ĉiu *multeco*, en si malkaŝante sin mem en la *nombroj de origino*, el kiuj estiĝas ĉia *infinitobleco* de la spirita vivo ...

Tiu ĉi eterna *esto* de la spirito, samtempe *memmalkaŝo* de la spirito kaj la spirita *sekvo* de tiu *memmalkaŝo*:

en *nekkaptebleco*

en *unueco*

en *nombro*, –

kiu plue generas *unuecon infinitoble* – estas fina *realo*, per kiuj ajn vortoj oni volas sciigi pri ĝi, ĉar kun la sama rajto oni povus nomi tiun eston:

tio eterna *nemalkaŝita*,

tio eterne sin *malkaŝanta*,

tio eterna *malkaŝita*. –

Sed ĉiu vorto de homa lingvo ĉiam restos balbutado, se ĝi sciigu pri la *vivo l' spirito*, kiu estas kaptebla sole en *amo*, kiu faras ankaŭ la *homspiriton*, kiu iam sin *eligis* el la amo, denove kapabla por ĝia origina *dieca* spertado. –

Sed la „*spirito de vero*“ estas la *vivo* de la *Pralumo*: – la *Pralumo mem* en sia *nekkaptableco* – kiu sin malkaŝas kiel la *Pravorton* kaj *en* kiu vivas ĉiuj spiritaj hierarkioj, kiuj estas kvazaŭ *tono kaj voĉo* de tiu ĉi *Pravorto* kaj ĝia eterne plugeneranta manifestiĝo en la spirita mondo de la *Pralumo*.

Ankaŭ la *malalta* spirita vivo, kiu restis al la *homspirito* post ĝia falo el alta lumado, vivas nur el la sama *spirito de vero*: el la substanca spirito de la eterna *Pralumo*, de kiu la

homspirito povas, jam en tiu ĉi surtera vivo, ekkapti „*radion*“ kaj ekkoni ĝin en sia propra „*mi*“ kiel sian „*vivantan Dion*“.

La *Pralumo sola* estas la eterna fonto de ĉiu *vivo*: tio *estanta* el si mem!

En si kiel *esto* estante nekaptibla por si mem, ĝi „elparolas“ sin en la *Pravorto*, kiu havas sian *vivon* en ĝi sola „el si mem“...

Kaj, plugenerante, la *Pravorto* sin malkaŝas en la *eterna spiritohomo*, kiu „el si mem“ havas la *saman* *vivon* nur en la *Pralumo* kaj plugeneras la hierarkiojn de ĉiuj *spiritaj estaĵoj*, kiuj ĉiuj havas la *vivon* „el si mem“, ĉar ili ĉiuj estas la proksima aŭ malproksima *manifestiĝo* de la *Pralumo* per la *Pravorto*, kiu mem estas la unua, eterna manifestiĝo de la *Pralumo*. – –

Sed la *amo*, kiu amas *sin mem* en *tio alia*, estas la plej interna impulso de ĉiu ĉi manifestiĝo de la *Praesto*. –

Kiu volas eniri „*en la spiriton*“, – volas denove konscie senti en si la *vivon* de la *Pralumo*, tiu antaŭ ĉio strebu al tio, ke li konstante estu „*en la amo*“! –

*Al tiu* oni malfermos la malvastan pardonon kiu kondukas al la *vivo*, ĉar li scias *frapi*, – li *serĉas* en *ĝusta maniero*, kaj certe scios *trovi* lin la „*parakleto*“.

\*

## Epilogo

Kie en tiu ĉi libro mi kunplektis vortojn de la *tradiciita* teksto al mia parolo, mi enprenis ilin nur, se doniĝis al mi la spirita *certeco*, ke ili ankoraŭ konformas al la *senco* de la *origina teksto*, kaj kie ili *ne* konformis, mi klopodis redoni tiun originan *sencon* en *miaj* vortoj.

Ĉar mi interpretas en tiu ĉi libro nur la malnovan mesaĝon rigardatan kiel la „*evangelio laŭ Johano*“, mi intence preterlasis majstrovortojn, kiuj troviĝas ankaŭ en la tri *pli fruaj* raportoj pri la surtera vivo de l' majstro kaj pri kiuj mi estas same certa, ke ili estas aŭtentikaj. Mi faris tion, kvankam ili ofte estus donintaj konfirmon al tio, kion mi havis por diri.

Sed kiu sekvas miajn vortojn, tiu scios facile *mem* eltrovi *tion ne falsitan* en la aliaj raportoj, same kiel li jen kaj jen ankaŭ malkovros la *motivojn* por *enmetado* kaj *ŝanĝado* en la malnova mesaĝo kiel en la pli fruaj raportoj.

Tie ĉi oni ne povas nei, ke pli ol unu vorto, kiu iam estis kara al tiuj, kiuj ekde sia junaĝo kredis je la *dieco* de la malnovaj skriboj kaj eble ankoraŭ nun opinias ĝin sankta, estas nur pli malfrua *elpensaĵo*.

Sed se tiuj vortoj povas iel esti rigardataj kiel *portantoj de vero*, mi ne vidas iun kaŭzon por estimi ilin malalte aŭ eĉ kondamni ilin.

La pli malfruaj reviziantoj de la malnovaj skriboj – se oni taksas ilin kiel „*poetojn*“ – ofte estis multe *superaj* al la originaj verkintoj. Ili trovis ne malmultajn *bildojn* kaj *legendoformojn* por kunligi la kredopinion servatan de ili kun la malnovaj tekstoj: bildoj kaj legendoj, pro kiuj la originaj aŭtoroj vere estus povintaj envii ilin. –

Sed ne estas la samo, ĉu oni volas lerni *ekkoni* tion, kion la *origina teksto* prezentis, aŭ ĉu oni serĉas pian *edifon* en la vortoj de *poeto*, kiu penas krei dokumenton por sia arde amata kredo.

Ĉar en la malnova mesaĝo, kiu tie ĉi devis esti interpretata, la origina teksto estas *superkreskita* de poezio, kaj estis do falsata dokumento, kiu estus prezentiĝinta por la posteularo kiel *sola* sciigo pri la pura instruo donita de la alta majstro *nur* al la *plej proksimaj* disĉiploj, estis tre grave, restarigi sole la nefalsitan *enhavon* de la *origina teksto*.

Sekve de teksta aranĝo, per kiu ĉiu frazo ŝajnas *memstara* kaj kiu donas al ĝi *preskaŭ izolitan signifon*, eĉ se ĝi troviĝas en loko *alia* ol tiu *origina*, ĉiu kredopinio poste senpripense rigardis sin kapabla tiri frazojn, kiuj estis *ĝenaj* al ĝi, el la kunteksto kaj tiam arbitre enmeti ilin tie, kie ili aparte *servu* al ĝi. Kie troviĝis vorto, kiun oni ne ŝatis, tie oni senskrupule eligis, kiel aldonajon de „*herezuloj*“, tion, kio portis la *stamp-on de la originalo*; kaj kio tamen ŝajnis tro grava por esti eligata, al tio oni almetis *enŝovajon* aŭ *aldonajon*, kiu *inversigis* la *originan* sencon.

Krome, oni tre volonte enmetis vortojn, kiujn la majstro estis parolinta en tute *alia* kunteksto, en la *miraklolegendojn* estiĝintajn baldaŭ post lia morto, por tiumaniere firmigi la pian kredon je tiuj miraklofabeloj.

Sennombraj teksteroj estas *distorditaj*, la senco de sen-nombraj *inversigita*, kaj tamen restas ankoraŭ konservita la spuro de la *pura instruo*, – tamen lumas tra la tuta teksto la alta *amo*, kiu konserviĝis kiel heredaĵo de l' apostolo eĉ en la plej malproksimaj el liaj postnaskitaj disĉiploj, kaj kiu montras ankaŭ la aŭtoron kiel *amanton* en la lumo de la *pura instruo*, kiun li volis *konservi* al la siaj, al kiuj direktiĝis liaj vortoj – *pura*, kiel li mem estis ricevinta ĝin – nemiksita kun kredopinioj, en kiuj li tre klare vidis eraron. –

El tio alia, kio – egale al tiu ĉi malnova mesaĝo – estis atribuita al la *disĉiplo*, kiun la majstro „*amis*“, ĉar li ekkonis, ke tiu estas „*en la amo*“, *nenio* estis skribita de tiu disĉiplo, kaj *nenio* el tio venas el la skriboplumo de l' aŭtoro de tiu ĉi mesaĝo.

Kion oni rigardas kiel „*leterojn*“ de la *disĉiplo Johano*, tio certe entenas kelkajn belegajn vortojn de saĝo kaj vere estas esprimo de homspirito, kiu vivis „*en la amo*“, sed tiuj leteroj estis skribataj, post kiam la *mesaĝo* tie ĉi priparolata jam estis asimilita al la nova kulto, kaj ilia aŭtoro estis kredanto de tiu kulto.

La libro „Apokalipso“ estas la verko de tre *diversvaloraj* spiritoj, kaj la atesto de *diversaj tempoj*.

Troviĝas en ĝi la spuroj de „sciantoj“ apud la mistera garnaĵo, kiun la libro ricevis de kredantoj de la nova kulto, kaj la malavaraj aldonaĵoj de pli malfruaj prilaborantoj.

Tiu, kiu donis al la enhavo de tiu ĉi libro la grandiozan poezian formon, nur uzis materialon, kiu ekzistis longe *antaŭ* li kiel atesto de mistikaj vizioj. –

Sed la *pura instruo*, kiun la alta *majstro* iam estis doninta al siaj plej proksimaj disĉiploj kaj kiun nur tiu *unu*, kiun li „amis“, tute ekkaptis, por peri ĝin al tiuj sin tenantaj al *li*, estas ekkonebla nur en tiu ĉi *mesaĝo*, kiun poste note skribis homo, kiu vivis plene *en la spirito de tiu ĉi instruo*.

La *saĝo*, kiun entenas tiu ĉi mesaĝo, malgraŭ ĉia manipulado kiun ĝi devis suferi, *ne perdiĝu* al la serĉantoj en la estonta tempo! –

\*



Tradukoj de pliaj libroj  
el la spirita verkaro de Bô Yin Râ  
estas elŝuteblaj ĉe jena retejo:  
<http://www.a-rehfeldt.de>